<b>Supre</b> , upstairs.	<b>Skribado</b> , writing (n.).
<b>Malsupre</b> , downstairs.	<b>Konservi</b> , to keep.
<b>Ĉapelo</b> , hat.	<b>Kalkuli</b> , to count.
<b>Vesto</b> , coat.	<b>Kalkulado</b> , counting (n.).
<b>Libro</b> , book.	<b>Vorto</b> , word.
<b>Kajero</b> , copybook.	<b>Frazo</b> , sentence.
<b>Plumo</b> , pen.	<b>Lerta</b> , clever.
<b>Kaj tiel plu</b> } etc.,	<b>Problemo</b> , problem.
<b>K. T. P.</b> } and so forth.	

## LA LERNEJO

La lernejo de nia vilaĝo estas sur la granda placo inter la domo de la kombisto kaj la panejo. Ĝi ne estas tre granda domo, sed ĝi estas blanka, simpla kaj pura. La lernejo havas nur tri etaĝojn, la teretaĝon sur la tero, la unuan etaĝon kaj la duan etaĝon sub la tegmento. Sur la teretaĝo estas granda ĉambro, kie povas sidi ĉiuj infanoj de la lernejo. Ĉiumatene ili kantas tie antaŭ la komenco de la lecionoj.

Sur la unua etaĝo estas kvar ĉambroj; unu klaso por la knaboj, du klasoj por la knabinoj kaj unu ĉambro por la vestoj kaj ĉapeloj de la infanoj, ĝi estas la vestejo. Supre, sur la subtegmenta etaĝo, estas kelkaj ĉambretoj, kie la instruistoj konservas la librojn, kajerojn, paperojn, plumojn, k.t.p. Malsupre, sub la teretaĝo estas ankaŭ granda subtera ĉambro, kie la geknaboj ludas aŭ faras gimnastikajn ekzercojn.

La infanoj de nia vilaĝo ŝatas la lernejon, ĉar la lecionoj ne estas tro longaj kaj la geinstruistoj estas bonaj kaj afablaj al ĉiuj geknaboj. La panisto havas tri filinojn, kiuj iras ĉiuj al la lernejo. Lia filo estas tro juna kaj li ne povas iri kun la fratinoj. La kombisto havas unu filon kaj unu filinon, kaj ambaŭ geknaboj iras al nia lernejo. La instruistinoj tre amas la filinon de la kombisto, ĉar ŝi estas tre gaja kaj afabla. Ŝi tre bone la-

boras, sed, eĉ se ŝi ne farus tion, oni pardonus ŝin facile, tiel afabla ŝi estas. En la lecionoj la infanoj devas esti trankvilaj kaj aŭskulti bone. Tiuj, kiuj ne bone aŭskultas, ne povas bone lerni. La instruisto punas tiujn, kiuj ludas en la lecionoj kaj ne faras la laboron. Hieraŭ muŝo flugis tra la klaso de la knabinoj, kaj unu el la filinoj de la panisto volis ĝin kapti; sed la instruistino ŝin punis, ĉar ŝi ne aŭskultis la lecionon.

En nia lernejo oni instruas la infanojn pri legado, skribado kaj kalkulado. En la komenco ili legas simplajn librojn kaj skribas mallongajn vortojn kaj frazojn. Ili faras facilajn kalkulojn. La plej junaj malfacile kalkulas, ĉar oni devas longe lerni, se oni volas kalkuli facile kaj rapide. La instruisto estas tre lerta pri kalkulado, kaj li ŝatas malfacilajn problemojn. Kiam li estas sola, li kalkulas, dum liaj knaboj ludas en la ĝardeno.

La knabinoj ŝatas aŭskulti legadon de la plej juna instruistino, ĉar ŝi havas tre dolĉan voĉon kaj ŝi legas belajn librojn. Dum ŝi legadas, la infanoj estas tre trankvilaj, ĉar ili pli ŝatas tion ol la lernadon.

#### A. QUESTIONS TO ANSWER WITH "NO"

1. Ĉu ni havas grandan lernejon? Ne, en nia vilaĝo ni havas nur malgrandan lernejon.



2. Ĉu la domo estas alta? Ne, ĝi havas nur tri etaĝojn.
3. Ĉu ni havas multajn klasojn?
4. Ĉu la infanoj lernas en la teretaĝa ĉambro?
5. Ĉu ili kantas en ĉiuj lecionoj?
6. Ĉu estas du klasoj por knaboj?
7. Ĉu la infanoj havas la ĉapelojn en la klasoj?
8. Ĉu la vestejo estas sur la teretaĝo?
9. Ĉu estus pli bone, se la vestejo estus sur la dua etaĝo?
10. Ĉu vi havas infanojn, kiuj iras al nia lernejo?
11. Ĉu la gimnastikejo estas supre?
12. Ĉu la infanoj malŝatas la lernejon en nia vilaĝo?

B. QUESTIONS TO ANSWER WITH THE NAME OF A PERSON (KIU?)

1. Kiu iras al la lernejo?
2. Kiun vi vidas sur la strato?
3. Kiu instruas la knabinojn?
4. Kiu havas tri filinojn?
5. Kiu havas du gefilojn?
6. Kiun amas la instruistinoj?
7. Kiun la instruisto punis hieraŭ?
8. Al kiu vi donis mian kajeron?
9. Kun kiu ludas la filo de la kombisto?
10. Kiu sidas en la klaso apud via frato?
11. Kiu ne aŭskultis la lecionon hodiaŭ matene?
12. Kiu ŝatas kalkuladon?

C. QUESTIONS TO ANSWER WITH THE  
NAME OF A DEFINITE PERSON  
OR THING (WHICH?)

1. Kiu knabo ludis hieraŭ kun vi? La knabo,  
kiu plej bone kalkulas, ludis kun mi.
2. Kiun tablon vi prenis hieraŭ? Mi prenis la  
malgrandan tablon de la panisto.
3. En kiu klaso via filo sidas?
4. Kiu instruistino legas plej bone?
5. Kiujn librojn vi plej ŝatas?
6. Kiun lecionon ŝatas la infanoj?
7. En kiu ĉambro ili faras gimnastikajn ekzer-  
cojn?
8. Kiujn knabojn amas la instruisto?
9. Sur kiu etaĝo estas la klasoj?
10. En kiu ĉambro la infanoj kantas?
11. En kiu ĉambro estas la vestoj kaj ĉapeloj de  
la geknaboj?
12. Kiu knabino kaptis muŝon?

D. QUESTIONS TO ANSWERS WITH THE  
NAME OF A PLACE (WHERE?)

1. Kie estas la lernejo?
2. Kie kantas la infanoj?
3. Kie oni konservas la librojn kaj kajerojn?
4. Kie estas la gimnastikejo?
5. Kie loĝas la filinoj de la panisto?

6. Kie liaj infanoj lernas?
7. Kie la instruisto kalkuladas?
8. Kie ludas liaj knaboj?
9. Kie vi prenis tiun ĉi tablon?
10. Kie estas la dua etaĝo?

E. QUESTIONS TO ANSWER WITH THE  
NAME OF A THING (WHAT?)

1. Kion via knabo prenis? Li prenis tion ĉi.
2. Kion oni lernas en nia lernejo?
3. Kion faras la infanoj ĉiutage?
4. Kio estas malsupre?
5. Kion oni konservas supre, sub la tegmento?
6. Pri kio oni instruas la infanojn?
7. Kion la knabinoj plej facile lernas?
8. Kion la knaboj malfacile lernas?
9. Kio estas en la vestejo?
10. Kion la infanoj ŝatas aŭskulti?
11. Kion legas la fraŭlino?
12. Kio flugis hieraŭ tra la ĉambro?

F. QUESTIONS TO ANSWER WITH A COM-  
PLEMENT OF TIME (WHEN?)

1. Kiam la infanoj iras al la lernejo? Ĉiutage ili iras al la lernejo.
2. Kiam vi vidis mian fraton? Hieraŭ vespere mi vidis lin.

3. Kiam la geknaboj kantas?
4. Kiam la muŝo flugis tra la ĉambro?
5. Kiam la instruisto punas la knabojn?
6. Kiam la knabinoj estas trankvilaj?
7. Kiam la knaboj skribos frazojn?
8. Kiam mia filino povos bone kalkuli?
9. Kiam vi plej facile laboras?
10. Kiam vi iris al la lernejo?
11. Kiam la infanoj ludas en la ĝardeno?
12. Kiam la gepatroj estas kontentaj?

#### G. QUESTIONS TO ANSWER WITH A COMPLEMENT OF MANNER (HOW?)

1. Kiel laboras via filineto? Si ne laboras tre bone.
2. Kiel lernas ŝia frato? Li lernas pli bone ol ŝi.
3. Kiel vi ŝatas tiun ĉi libron?
4. Kiel kantas via fratino?
5. Kiel kuras la infanoj?
6. Kiel parolas mia onklo?
7. Kiel kalkulas la instruisto?
8. Kiel legas la juna instruistino?
9. Kiel ŝin aŭskultas la knabinoj?
10. Kiel estas la maljuna vendistino?
11. Kiel forta vi estas?
12. Kiel sanas via patro?

## 16. DEK SESA LECTONO

(See Grammar, § 17)

1 unu	20 dudek
2 du	30 tridek
3 tri	40 kvardek
4 kvar	50 kvindek
5 kvin	60 sesdek
6 ses	70 sepdek
7 sep	80 okdek
8 ok	90 naŭdek
9 naŭ	91 naŭdek unu
10 dek	98 naŭdek ok
11 dek unu	100 cent
12 dek du	300 tricent
13 dek tri	1000 mil
18 dek ok	2000 dumil
19 dek naŭ	4000 kvarmil

75 sepdek kvin

189 cent okdek naŭ

1226 mil ducent dudek ses

14375 dek kvarmil tricent sepdek kvin

 396742 tricent naŭdek sesmil sepcent kvar-  
dek du

Kiom da jaroj? How many years?

 Kiom estas trifoje kvar? How much are three  
times four?

1. Kiom da infanoj havas la panisto? Li havas kvar infanojn.
2. Kiom da geknaboj iras al nia lernejo? Cent tridek unu iras al nia lernejo.
3. Kiom da knaboj instruas la instruisto? Li instruas kvindek tri knabojn.
4. Ĉu estas pli multe da knabinoj? Jes, ni havas sepdek ok knabinojn en la lernejo.
5. Kiom da knabinoj estas en ĉiu klaso? Estas kvardek en unu klaso kaj tridek ok en la alia.
6. Kiom estas dek kvin kaj tridek du? Ĝi estas kvardek sep.
7. Kiom estas sepfoje dudek? Ĝi estas cent kvardek.
8. Kiom estas dek dufoje naŭ? Ĝi estas cent ok.
9. Kiom estas centfoje kvindek tri? Ĝi estas kvinmil tricent.
10. Kiom da geservistoj havas via onklo? Li havas tri servistojn, du servistinojn kaj unu ĝardeniston, tio estas ses geservistoj.
11. Kiom da urboj vi vidis? Mi ne vidis multajn; mi kredas, ke mi vidis dudek urbojn.
12. Kiom da personoj estos ĉe vi morgaŭ? Ni havos morgaŭ ĉe ni tridek sinjorinojn kaj dudek ok sinjorojn.

17. DEK SEPA LECIONO

(See Grammar, § 18, § 19, § 20, and § 21)

<b>Unua</b> , first.	<b>Trie</b> , thirdly.
<b>Dua</b> , second.	<b>Duo</b> , duet.
<b>Tridek sesa</b> , thirty-sixth.	<b>La centoblo</b> , the hundred-fold.
<b>Triono</b> , a third.	<b>Po dek cendoj al ĉiu</b> .
<b>Dekono</b> , a tenth.	At the rate of ten
<b>Duona pomo</b> , half an apple.	cents to each one.
<b>Duobla</b> , double.	<b>Lasta</b> , last.
<b>Kvaroble</b> , quadruply.	<b>Tuta</b> , whole, entire.
<b>Unue</b> , firstly.	<b>Dekduo da ovoĵ</b> , a dozen eggs.

1. Kiu estas la unua en via klaso? Mia amiko Paŭlo estas ofte la unua.
2. Kioma vi estas? Mi estas la dek unua, sed ne la lasta.
3. Ĉu vi venos kanti kun ni hodiaŭ vespere? Jes, sed unue mi devos vespermanĝi.
4. Kion vi faros morgaŭ? Morgaŭ mi unue matenmanĝos, due mi iros al la urbo, trie mi vizitos vin kaj kvare mi invitos vin por tagmanĝi kun kelkaj amikoj.
5. Ĉu vi ricevis bonan pomon? Mi ne ricevis tutan pomon, sed nur duonan.
6. Kiom da pomoj vi havas? Mi havas kvar pomojn kaj tri kvaronojn da pomo.

7. Ĉu vi trinkis tutan fason da teo? Ne, mi eĉ ne trinkis la kvaronon da mia teo.
8. Kiom estas la dekoblo de kvin? Ĝi estas kvindek.
9. Kiom estas centoble tri kvaronoj? Ĝi estas sepdek kvin.
10. Kiu estis en via ĝardeno hieraŭ posttagmeze? Ni havis tie dekon da afablaj fraŭlinoj, ĉiuj amikinoj de mia fratino.
11. Ĉu vi tute faris vian laboron? Ne, sinjoro, mi ĝin nur duone faris.
12. Ĉu vi povis manĝi tiun kukon kaj tiujn pomojn? Ne, la kuko estis duone manĝebla, sed la pomoj estis tute nemanĝeblaj.
13. Kiu parolis la plej mallonge hieraŭ vespere? Mi kredas, ke via patro parolis plej mallonge; ĉiuj aliaj sinjoroj parolis trioble pli longe ol li.
14. Kiom vi donos al tiuj infanoj por ilia laborado? Mi donos al ĉiu po dek cendoj.

## 18. DEK OKA LECIONO

(See Grammar, § 12)

Mi restos <b>DUM</b> dek kvin tagoj	} I will stay (during)
Mi restos dek kvin tagoj <b>N</b>	



Li iris <b>AL</b> Parizo	}	He went to Paris.
Li iris Parizon		
Tio kostas <b>PO</b> tri dolaroj	}	That costs
Tio kostas tri dolaroj <b>N</b>		
Ili obeas <b>AL</b> la patro	}	They obey the father.
Ili obeas la patron		

1. Kiom da tagoj vi restis sur la monto? Mi restis tie dek tagojn.
2. Kiom da tagoj vi restos en nia domo? Mi kredas, ke mi povos resti ne pli ol tri tagojn.
3. Ĉu vi iros morgaŭ al Londono? Ne, sinjoro, mi ne iros Londonon, ĉar mi ne havas tempon por tio.
4. Ĉu vi loĝis nur kvin semajnojn ĉe via onklo? Ne, mi loĝis ĉe li multe pli longan tempon.
5. Kiom kostas tiu ĉi libro? Tiu ĉi kostas nur duonan dolaron.
6. Kiom da tempo vi volas resti en nia vilaĝo? Mi ne volas resti pli ol kvar semajnojn.
7. Kie vi estis? Mi estis en Londono.
8. Kien vi iras? Mi iras Parizon.
9. Kien kuras tiu ĉi knabo? Li kuras al la lernejo.
10. Ĉu vi ankaŭ iras tien? Jes, mi devas iri tien por vidi mian amikon, kiu instruas la knabojn.
11. Kiel vi faris vian laboron? Mi ĝin tute ne faris, ĉar mi devis iri Berlinon kaj restis tie du longajn semajnojn.

12. Kiam vi ĝin faros? Mi faros ĝin kiam mi havos pli da tempo.
13. Kiel vi sanas, sinjorino? Mi estis malsaneta hieraŭ, sinjoro, sed hodiaŭ mi opinias, ke mi povos iri al la urbo.
14. Ĉu estas vere, ke la filo de tiu sinjoro iris tiel rapide al la vilaĝo? Jes, estas vere, ĉar li kuris la tutan tempon.

## 19. DEK NAŬA LECIONO

(See Grammar, § 12)

**La kato estas en la ĉambro.** The cat is in the room.

**Li iras en la ĉambroN.** He goes into the room.

**Li sidas sur la tablo.** He sits on the table.

**Li saltas sur la tabloN.** He jumps upon the table.

**Meti,** to put.

**Nenio,** nothing.

**Verŝi,** to pour.

1. Kie vi kuris? Mi kuris en la ĝardeno kun aliaj infanoj.
2. Kien vi kuros? Mi kuros en la domon, se vi volas.
3. Ĉu la kato estas en la ĉambro? Ne, li saltis en la ĝardenon tra mia fenestro.
4. Ĉu via fenestro estas tre alta? Ne, ĝi estas tre malalta, ĉar mia ĉambro estas sur la tertaĝo.

5. Ĉu vi havas teon en via taso? Ne, sinjoro, vi estus tre afabla, se vi metus teon en ĝin.
6. Kion vi verŝis en vian glason? Mi verŝis nenion en mian glason, sed mi metis bieron en la vian.
7. Ĉu vi ne volas trinki bieron? Ne, mia amiko, mi pli ŝatus, se vi nenion metus en mian glason, dum mi estas en alia ĉambro.
8. Ĉu vi vidis la belan novan seĝon, kiun ricevis mia onklo? Ne, mi ĝin ne vidis, ĉar mi ne iris en lian ĉambron.
9. Kiel vi povis paroli tiel malafable al tiu sinjoro? Mi ne volis esti malafabla, mi nur ŝercis.
10. Kiam vi venos en mian klason? Mi kredas, ke mi povos veni morgaŭ, ĉar mi havos tempon dum la posttagmezo.
11. Kiom da tempo vi kuris hodiaŭ matene? Mi kuris longan tempon kaj, kiam mi venis en la klason, mi ne povis paroli.
12. Ĉu vi ne kredas, ke estus multe pli bone, se mia infanino ne venus kun mi sur la straton, ĉar ŝi ne sanas tute bone? Estus vere pli bone, se ŝi restus en la domo; ŝi povos vidi la ludadon, de unu el la fenestroj de la manĝoĉambro.

## 20. DUDEKA LECIONO

(See Grammar, § 1)

<b>Valo</b> , valley.	<b>Akvo</b> , water.
<b>Kampo</b> , field.	<b>Freŝa</b> , fresh.
<b>Kulturi</b> , to cultivate.	<b>Veni</b> , to come.
<b>Tero</b> , earth.	<b>Por</b> , for, in order to.
<b>Arbo</b> , tree.	<b>Ŝaf</b> , sheep.
<b>Arbaro</b> , forest.	<b>Hundo</b> , dog.
<b>Paŝti</b> , to feed.	<b>Gardi</b> , to watch.
<b>Paŝtisto</b> , shepherd.	<b>Tro</b> , too.
<b>Paŝtejo</b> , pasture-land.	<b>Ĝojo</b> , joy.
<b>Tombo</b> , tomb.	<b>Aŭdi</b> , to hear.
<b>Tombejo</b> , cemetery.	<b>Aŭskulti</b> , to listen.
<b>Supre</b> , above, up there.	<b>Soni</b> , to sound (intrans.).
<b>Supren</b> , up.	<b>Ekaŭdi</b> , to begin to hear.
<b>Supreniri</b> , to go up.	<b>Ekvidi</b> , to perceive.
<b>Malsupre</b> , down there.	<b>Ekkanti</b> , to start singing.
<b>Stari</b> , to stand.	<b>Eksoni</b> , to start sounding.
<b>Kapelo</b> , chapel.	<b>Halti</b> , to stop.
<b>Ĉirkaŭ</b> , around.	<b>Nova</b> , new.
<b>Ŝtono</b> , stone.	<b>Sonori</b> , to ring.
<b>Silenta</b> , silent.	<b>Sonorado</b> , ringing.
<b>Limo</b> , end, limit.	<b>Vojo</b> , the way.
<b>Fonto</b> , spring.	<b>Kompreni</b> , to understand.
<b>Ŝpruci</b> , to spurt, to gush.	<b>Iu</b> , some one.
<b>El</b> , out of, from.	
<b>Inter</b> , between.	

Morti, to die.	Ĉiu, each, every one.
Porti, to bring, to carry.	Preni, to take.
Eble, perhaps, possibly.	Nun, now.
Pensi, to think.	Atento, attention.
Pri, about, of.	Iam, some day.
Jam, already.	De l' = de la.
Muziko, music.	Ĉe l' = ĉe la.
Sonorilo, bell.	Tra l' = tra la.

### EN LA VALO

En la valo estas kelkaj vilaĝetoj tre malgrandaj. Ĉirkaŭ la vilaĝoj estas la kampoj, kie la homoj laboras por kulturi la teron. Estas ankaŭ arbaro kaj paŝtejoj apud la monto. La monto estas malalta. Ĝi estas nur monteto. Supre, sur la monteto staras kapelo. Ĉirkaŭ la kapelo estas la tombejo. En la tombejo estas multaj tomboj kun ŝtonoj kaj arbetoj. La kapelo kaj la tombejo estas tute silentaj sur la monteto. Malsupre, sur la paŝtejo, ĉe la limo de l'arbaro, bela fonto elŝprucas el la tero inter ŝtonoj. La akvo estas freŝa, pura kaj travidebla. Juna knabo venas ofte trinki tie. Li estas paŝtisto, li paŝtas ŝafojn kaj li havas ankaŭ hundon, por gardi ilin, se ili kuras tro malproksimen. La knabo estas ĝoja kaj li kantas gaje. Subite li ekaŭdas muzikan sonon. La malnovaj sonoriloj de la kapelo sonoras malrapide kaj malgaje. Li haltas en kantado kaj aŭskultas. Ankaŭ li aŭdas mal-

gajan kantadon. Li ekvidas malproksime sur la vojo al la monteto multajn homojn, kiuj supreniras malrapide. La knabo ekkomprenas: Iu mortis en la valo kaj oni portas lin supren en la tombejon. Eble la panisto mortis, ĉar li estis tre malsana la lastajn tagojn.

La juna knabo pensas pri lia familio, liaj infanoj. Li ankaŭ pensas pri la morto. Estas jam multaj tomboj ĉirkaŭ la kapelo, sed ĉiuj homoj malsupre en la valo, ĉiuj venos iam en la tombejon. Ankaŭ li, la juna knabo, kiu kantas ĝoje la tutan tagon, oni prenos lin tien. Kiam? Li pensas longe pri tio. Nun la sonoriloj eksilentas, la homoj jam ne estas videblaj sur la vojo. Eble ili nun estas en la tombejo. Sur la kampo la ŝafoj trankvile paŝtas kaj la hundeto kuras ĉirkaŭ ili.

### LA KAPELO\*

Supre staras sur la monto  
 La silenta kapeleto.  
 En la valo, ĉe la fento,  
 Goje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado  
 Nun eksonis tra l'silento.

\* El germana originalo de Uhland, tradukis L. L. Zamenhof.

Haltis knabo en kantado  
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l'monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,  
Oni tien iam prenos.

A. **ĈU** (WHETHER? YES? OR NO?)

1. Ĉu estas multaj domoj en la valo? Ne, tie estas nur malmultaj domoj, ĉar estas nur kelkaj vilaĝetoj.
2. Ĉu la monto estas alta?
3. Ĉu la tombejo estas en la valo?
4. Ĉu la kapelo estas bela?
5. Ĉu la kapelo havas belajn sonorilojn?
6. Ĉu estas iu en la tombejo?
7. Ĉu la akvo de la fonto estas bona?
8. Ĉu oni povas vidi tra la akvo?
9. Ĉu la paŝtisto estas maljuna?
10. Ĉu la knabo aŭdis la sonradon?
11. Ĉu li pensas pri la homo, kiu mortis?

B. **KIU** (WHO? OR WHICH?)

1. Kiu staras apud la fonto?
2. Kiu supreniras al la kapelo?
3. Kiu restas malsupre en la valo?

4. Kiu mortis en la valo?
5. Pri kiu pensas la knabo?
6. Kiun oni portas al la tombejo?
7. Kiun oni ankaŭ iam prenos en tombon?
8. En kiu domo loĝis la panisto?
9. Kiujn sonorilojn aŭdis la knabo?
10. Kium akvon li trinkas ofte?
11. Sur kiu vojo la homoj supreniras?

### C. KIO (WHAT?)

1. Kio estas en la valo?
2. Kio estas sur la monto?
3. Kio estas ĉirkaŭ la kapelo?
4. Kio estas en la tombejo?
5. Kion faras la paŝtisto?
6. Kion li gardas kun la hundo?
7. Kion li ekaŭdis?
8. Pri kio li pensas?
9. Kio elŝprucas el la tero?
10. Kion li trinkas ofte?
11. Apud kio sidas la knabo?
12. Kio estas sur la tomboj?

### D. KIEL (HOW?)

1. Kiel kantas la paŝtisteto? Li kantas tre ĝoje.
2. Kiel kantas la homoj sur la vojo?
3. Kiel estas la kapelo?



4. Kiel estas la tombejo?
5. Kiel sonoras la malnovaj sonoriloj de l'kapelo?
6. Kiel aŭskultas la knabo?
7. Kiel estas la akvo de l'fonto?

### E. KIAM (WHEN?)

1. Kiam kantas la juna paŝtisto?
2. Kiam li haltis en kantado?
3. Kiam la panisto estis malsana?
4. Kiam li mortis?
5. Kiam oni portas la homojn en la tombon?
6. Kiam oni prenos la knabon en la tombejon?
7. Kiam la knabo estis malgaja?

### F. KIE (WHERE?)

1. Kie staras la kapelo?
2. Kie sidas la knabo?
3. Kien iras la homoj de la valo?
4. Kie estas la arbaro?
5. Kie elŝprucas la fonto?
6. Kie kuras la hundo?
7. Kie paŝtas la ŝafoj?
8. Kie estas ŝtonoj kaj arbetoj?
9. Kie kantadas la homoj?
10. Kie estas la vilaĝetoj?
11. Kie la knabeto vidis la homojn?
12. Kien oni prenos ĉiun iam?

## 21. DUDEK UNUA LECIONO

(See Grammar, § 2 and § 12)

<b>Semajno</b> , week.	<b>Dimanĉo</b> , Sunday.
<b>Lundo</b> , Monday.	<b>Sezono</b> , season.
<b>Mardo</b> , Tuesday.	<b>Printempo</b> , spring.
<b>Merkredo</b> , Wednesday.	<b>Somero</b> , summer.
<b>Ĵaŭdo</b> , Thursday.	<b>Aŭtuno</b> , autumn.
<b>Vendredo</b> , Friday.	<b>Vintro</b> , winter.
<b>Sabato</b> , Saturday.	<b>Sezono</b> , season.

**Mi vizitos vin lundon proksiman.** I will visit you on Monday next.

**Mi ne laboras dimanĉe.** I don't work on Sundays.

**En vintro mi restas hejme.** In winter I stay at home.

1. Kiam oni povas viziti vin, sinjoro? Ĉiulunde kaj ĉimerkrede la tutan matenon mi restas hejme.
2. Kiam vi aŭdis tiun kantistinon? Mi ŝin aŭdis nur unufoje, lastan semajnon.
3. Ĉu vi estas ofte malsana? Jes, mi estas malsana ĉiufoje kiam mi eliras el mia hejmo.
4. Kiam vi venos vespermanĝi kun ni? Mi venos eble proksiman merkredon.
5. Kion vi faros ĵaŭdon vespere? Mi kredas, ke mi iros aŭdi la kantadon.

6. Kion vi faris lastan dimanĉon vespere? Dimanĉon vespere mi frankvile restadis hejme, kiel mi faras ĉiudimanĉe.
7. Ĉu vi ne ricevis viziton hieraŭ matene? Jes, mia onklo vizitis min kaj li tagmanĝis ĉe mi kun mia kuzo Paŭlo.
8. Kiu vizitas tiun familion ĉiumerkrede? Mia fratino tion faras, ĉar ŝi volas helpi tiujn bonajn homojn.
9. Ĉu la patro de tiuj infanoj ne mortis lastatempe? Jes, li mortis kaj la infanoj estas tro junaj por jam laboradi.
10. Kiu zorgas pri ili la tutan tagon? Ili estas en la lernejo ĝis la vespero kaj tiam ilia patrino jam revenis hejmen.
11. Kiam via frato estas vizitebla? Li estas tre malofte vizitebla, sed eble vi povus lin viziti iam marde aŭ vendrede vespere.
12. Ĉu vi jam venis marde aŭ vendrede? Jes, mi venis lastan mardon kaj li ne estis hejme.

## 22. DUDEK DUA LECIONO

(See Grammar, § 12)

La Monatoj, the months.

Januaro.	Majo.	Septembro.
Februaro.	Junio.	Oktobro.
Marto.	Julio.	Novembro.
Aprilo.	Aŭgusto.	Decembro.

**Li foriros la dektrian de Majo.** He will depart on the 13th of May.

**Ŝi naskiĝis mardon la 22<sup>na</sup> de Julio.** She was born on Tuesday, the 22nd of July.

**Vojaĝi,** to travel. **Antaŭ tri jaroj,** three years ago. **Post kvar jaroj,** four years hence.

1. Kiam estas via naskiĝa tago? La lastan tagon de tiu ĉi monato: la tridekan de Novembro.
2. Kiun sezonon vi plej ŝatas? Vintron mi plej ŝatas, ĉar mi restadas hejme.
3. Ĉu vi ne ŝatas someron? Ne multe, ĉar mi devas vojaĝadi la tutan tempon.
4. Kion vi faras dum la aliaj sezonoj de la jaro? Mi laboras hejme kaj mi restas trankvile.
5. Kien vi vojaĝos proksiman jaron? Mi devas iri en somero al Afriko, kaj vi komprenas, ke ĝi ne multe plaĉas al mi.
6. Kiam vi foriros de via hejmo? Mi foriros la unuan de Junio.
7. Kien vi iris hieraŭ vespere? Hieraŭ mi restis la tutan tagon kaj ankaŭ la vesperon ĉe mia amiko Paŭlo.
8. Kiu estas li? Li estas tre juna instruisto en la vilaĝo, kie mi naskiĝis.
9. Ĉu li ŝatas instrui la knabojn tie? Jes, li ĝin ŝatas, kaj la junaj homoj lin tre amas.

10. Ĉu vi iam vidis vian kuzon lastan jaron? Ne, mi lin vidis nur la unuan semajnon de tiu ĉi jaro.
11. Ĉu li estas maljuna? Ne tre, li estas kvardek naŭ jara, mi kredas.
12. Ĉu lia frato estas pli juna ol li? Jes, li estas nur kvardek unu jara, ĉar li naskiĝis ok jarojn post la alia.
13. Kiam mortis ilia patro? Li mortis kvar jarojn post ilia patrino.
14. Kiam mortis ŝi? Mi kredas, ke ŝi mortis antaŭ dek du jaroj.
15. Kiam ili revenos tien ĉi? Ili volas reveni jam post dek monatoj, sed mi kredas, ke ili ne povos.

### 23. DUDEK TRIA LECIONO

(See Grammar, § 23)

**Kiom da tempo?** How long?

**Mi uzas unu horon.** It takes me one hour (I use one hour).

**Kioma horo estas?** What time is it?

**Duono post la kvara.** Half-past four.

**Je kioma horo?** At what time?

**Je 4.30 ĝuste.** At 4.30 sharp.

**Minuto,** minute.

**Sekundo,** second.

1. Kiom da tempo vi uzas por iri hejmen? De la urbo mi uzas du horojn al mia hejmo.
2. Kioma horo estis, kiam vi foriris? Estis ĝuste kvarono post la tria.
3. Je kioma horo vi venos al ni? Mi venos je kvin, tridek.
4. Ĉu li alvenis ĝustatempe? Ne, li alvenis nur je ses, dek kvin.
5. Ĉu vi povas vidi kioma horo estas nun? Jes, mi vidas, ke estas jam dek minutoj post la deka.
6. Kiam via patro foriros? Li foriros mardon la deknaŭan de Septembro je la kvina vespere.
7. Ĉu vi alvenis tro malfrue en la lernejon? Ne, mi alvenis ĝuste kiam la sonorilo eksonis.
8. Je kioma horo vi eliras el la lernejo? Ni eliras je la dua posttagmeze.
9. Ĉu en la aliaj urboj oni eliras tiel frue kiel vi? Jes, sinjoro, mi kredas, ke eĉ en kelkaj lernejoj oni eliras je la dekdua matene.
10. Kiam okazis la akcidento, pri kiu vi tiel multe parolis? Ĝi okazis ĝuste je kvardek minutoj post la tria matene, la dudeksepan de Aŭgusto, mil naŭcent du.
11. Antaŭ kiom da horoj alvenis via amiko? Li alvenis antaŭ tri horoj kaj foriros post kelkaj minutoj, ĝuste je la kvina.

12. Ĉu vi iam alvenis tro malfrue al la lernejo?  
 Jes, mi kelkafoje alvenis malfrue, sed multe pli ofte mi venis kvin aŭ eĉ dek minutojn tro frue.

## 24. DUDEK KVARA LECIONO

(See Grammar, § 5, Purpose Mode)

**Ni komencu!** Let us begin! **Rapidu!** Hurry!

**Ne rigardu ĝin!** Don't look at it!

**Mi volas, ke vi diru.** I wish you to tell.

**Li deziras, ke vi konu.** He desires that you may know.

**Li vokos lin, por ke li venu baldaŭ.** He will call him, in order that he may come soon.

1. Kion Paŭlo diris al via fratino? Li diris al ŝi: Venu tien ĉi kaj estu trankvila!
2. Kion vi deziras, sinjoro? Mi deziras, ke vi iru al la urbo kaj aĉetu por mi bonan blankan paperon.
3. Kiam vi deziras, ke mi iru tien? Mi deziras, ke vi tien iru kiel eble plej baldaŭ.
4. Ĉu vi volas, ke mi revenu morgaŭ al vi? Ne morgaŭ, sed la tagon postan mi dezirus vidi vin je tri kvaronoj post la dua.
5. Ĉu vi diris al li, ke li komencu la laboron? Jes, mi eĉ diris al li, ke li rapidu, ĉar estas jam malfrue.

6. Ĉu vi ne volas, ke oni aŭdu vin? Ne, mi pli ŝatas, ke vi restu en via ĉambro.
7. Ĉu vi faris tion, por ke mi ne povu alveni pli frue ol vi? Ne, mi ĝin faris, por ke vi pli bone zorgu pri viaj aferoj.
8. Kiu vokis min? Via patro vokis vin kaj diris, ke vi ne revenu pli malfrue ol la oka vespere.
9. Ĉu vi konas tiun ĉi homon? Jes, mi tre bone konas lin kaj mi ankaŭ konas tion, kion li diras al ĉiuj.
10. Kien mi devas iri? Venu kun mi al mia domo.
11. Ĉu mi devas ankaŭ veni kun vi? Ne, mia knabo, ne venu, ĉar ni iros tro rapide; reiru hejmen kaj ne haltu sur la vojo.
12. Ĉu vi vere diris al li, ke li kantu morgaŭ? Jes, mi diris al li, ke ni estus tre kontentaj, se li volus kanti en la komenco de la vespermanĝo.
13. Kion vi volas? Mi volas, ke vi bone konu la vilaĝojn, kien ni iros.

## 25. DUDEK KVINA LECIONO

(See Grammar, § 38, suffix -AN)

<b>Reĝo</b> , king.	<b>Princo</b> , prince.
<b>Moŝto</b> , majesty.	<b>Sidi</b> , to sit.
<b>Persujo</b> , Persia.	<b>Trono</b> , throne.



<b>Kunvoki</b> , to convoke.	<b>Tiom da</b> , so much, so many.
<b>Profesoro</b> , professor.	<b>Ankoraŭ</b> , still, yet.
<b>Akademio</b> , academy.	<b>Blanka</b> , white.
<b>Akademiano</b> , academieian.	<b>Haro</b> , hair (one piece).
<b>Lando</b> , country.	<b>Hararo</b> , hair (the whole).
<b>Estimata</b> , esteemed.	<b>Laca</b> , tired.
<b>Regi</b> , to rule.	<b>Resumo</b> , summary.
<b>Regado</b> , ruling.	<b>Rapidi</b> , to hurry up.
<b>Nacio</b> , nation.	<b>Prezidi</b> , to preside.
<b>Historio</b> , history.	<b>Prezidanto</b> , president.
<b>Homo</b> , man.	<b>Azeno</b> , donkey.
<b>Homaro</b> , humanity.	<b>Korto</b> , yard.
<b>Do</b> , then, so.	<b>Renkonti</b> , to meet.
<b>Je</b> , at (indefinite preposition).	<b>De</b> , since.
<b>Peti</b> , to ask, to beg.	<b>Mortanta</b> , dying.
<b>Por</b> , for, to.	<b>Lasi</b> , to leave.
<b>Verki</b> , to compose.	<b>Lito</b> , bed.
<b>Verkisto</b> , author.	<b>Kuŝi</b> , to lie down.
<b>Universala</b> , universal.	<b>Pala</b> , pale.
<b>Obei</b> , to obey.	<b>Laŭta</b> , loud.
<b>Palaco</b> , palace.	<b>Vorto</b> , word.
<b>Kamelo</b> , camel.	<b>Suferi</b> , to suffer.
<b>Libro</b> , book.	<b>Suferado</b> , suffering.
<b>Danki</b> , to thank.	<b>Kial</b> , why.
<b>Pro</b> , for, because of.	<b>Ofte</b> , often.
<b>Okupi</b> , to occupy.	<b>Ofta</b> , frequent.
<b>Okupado</b> , occupation.	<b>Malofta</b> , rare.
	<b>Facila</b> , easy.

## LA HISTORIO DE LA HOMARO

Kiam la maljuna reĝo de Persujo mortis, lia filo, la juna princo Zemir, eksidis sur la reĝa trono. Post kelkaj tagoj, li kunvokis ĉiujn profesorojn kaj akademianojn de la lando kaj diris al ili: “Estimataj sinjoroj, mia patro ofte instruis min, ke la reĝoj pli bone regus la naciojn, se ili pli bone konus la historion de la homoj. Mi do petas vin, ke vi verku por mi universalan historion de la homoj, por ke mi ĝin povu legi kaj ekkoni.”

La profesoroj obeis, kaj post dekkvin jaroj ili revenis al la palaco kun kvindek kameloj, kiuj portis kvinmil librojn. La reĝo estis malkontenta; li diris: “Sinjoroj, mi vin tre dankas pro via granda laborado, sed mi havas grandan okupadon je la regado de la lando, kaj mi ne havos tempon por legi tiom da libroj. Mi petas vin, ke vi rekomencu kaj faru multe pli mallongan historion.”

Post dek jaroj la profesoroj revenis kun kvin kameloj kaj kvincent libroj. La reĝo estis ankoraŭ ne kontenta. Li diris: “Mi vin dankas, sinjoroj, sed mi ne legos vian historion. Ankoraŭ tro longa tiu ĉi estas. Mi estas jam maljuna kaj havas blankajn harojn; mi estas facile laca. Mi petas vin, verku tre mallongan resumon de via historio, por ke mi povu ĝin legi antaŭ mia morto, kiu eble venos baldaŭ. Rapidu, sinjoroj, mi ne havos multajn jarojn por legi vian verkon!”

Dum la kvin postaj jaroj, multaj profesoroj jam mortis, kaj post ses jaroj, restis nur la maljuna prezidanto de la akademio. Li venis al la palaco de l'reĝo kun juna azeno, kiu portis unu grandan libron. En la granda korto de l'palaco li renkontis serviston, kiu diris al li: "Ha, sinjoro, la reĝo estas malsana de jam multaj semajnoj kaj hodiaŭ mortanta li estas. Se vi lin volas vidi, rapidu, rapidu al lia ĉambro!"

La maljuna akademiano lasis la azenon kaj la libron en la korto, kaj supreniris al la reĝa ĉambro. Sur la lito la reĝo kuŝis, tute pala; mallaŭte kaj malrapide li parolis: "Kara profesoro—vi venas—tro malfrue. Mi do mortas—kaj mi ne konas la historion—de la homoj."

Tre malgaja estis la profesoro, sed li diris: "Ne, Via Reĝa Moŝto, vi konas la historion de la homoj, ĉar mi ĝin diros al vi en tri vortoj:

*"Ili naskiĝis, ili suferadis, ili mortis."*

Oni diras, ke la reĝo mortis gaje, ĉar li estis kontenta koni tiun historion, eĉ tiel malfrue.

#### A. ĈU (WHETHER? YES? OR NO?)

1. Ĉu la princo estis juna?
2. Ĉu li konis la historion de l'homoj?
3. Ĉu li estis kontenta pri la unua verko de la profesoroj?
4. Ĉu la dua verko pli plaĉis al li?

5. Ĉu li havis tempon por legi multajn librojn?
6. Ĉu la kameloj estas maloftaj en Persujo?
7. Ĉu la reĝo dankis la profesorojn?
8. Ĉu la reĝo regadis longe la landon?
9. Ĉu li mortis juna?
10. Ĉu la maljuna prezidanto de l'akademio donis la libron al la reĝo?
11. Ĉu la reĝo povis aŭdi la historion de la homoj?
12. Ĉu la historio de la homaro estas tre longa?

B. **Kio?** What?

**Kiam?** When?

**Kiel?** How?

**Kiu?** Who? Which?

**Kie?** Where?

**Kiom da?** How many?

1. Kiam la juna princo eksidis sur la trono de Persujo?
2. Kiun li kunvokis?
3. Kion li deziris?
4. Kion li petis de la profesoroj?
5. Kiam revenis la profesoroj?
6. Kiom da libroj ili alportis?
7. Kiom da kameloj portis la librojn?
8. Kiom da libroj portis ĉiu kamelo?
9. Kiu estis malkontenta?
10. Kion li diris?
11. Kion faris la profesoroj?
12. Post kiom da jaroj ili revenis duan fojon?

13. Kie loĝas la reĝo?
14. Kiu mortis antaŭ la reĝo?
15. Kiu restis sole por verki la historion?
16. Kion alportis la maljuna profesoro?
17. Kiu portis la grandan libron?
18. Kie la prezidanto lasis la azenon?
19. Kiun li renkontis en la ĝardeno?
20. Kien li rapide supreniris?
21. Kiu kuŝis sur la lito?
22. Kiel parolis la reĝo?
23. Kion li diris?
24. Kion diris la prezidanto?
25. En kiom da vortoj li diris la tutan historion de la homoj?
26. Kiuj estas tiuj tri vortoj?

### C. KIAL (WHY?)

1. Kial la princo eksidis sur la trono? Li eksidis sur la trono, ĉar lia patro mortis.
2. Kial li kunvokis la profesorojn? Li kunvokis ilin, ĉar li deziris, ke ili verku por li historion.
3. Kial li deziris legi historion? Li deziris legi la historion, ĉar lia patro instruis lin, ke ĝi estas bona.
4. Kial reĝoj devus legi la historion? Ili devus legi ĝin, ĉar se ili konus la historion, ili pli bone regus la homojn.

5. Kial la reĝo estis malkontenta pri la verko de la profesoroj? Li estis malkontenta, ĉar ĝi estis tro longa.
6. Kial li ne povis legi ĝin? Li ne povis tion fari, ĉar li ne havis tempon.
7. Kial li ne havis tempon? Ĉar li devis labori je la regado de la lando.
8. Kial li estis reĝo de Persujo? Ĉar lia patro estis reĝo.
9. Kial lia patro estis reĝo? Ĉar la avo estis reĝo antaŭ li.
10. Kial la reĝo mortis? Li mortis, ĉar li estis maljuna, malsana kaj tre laca.
11. Kial la reĝo deziras mallongan historion?
12. Kial la profesoroj laboris tiel longe?
13. Kial ili revenis kun tiel multaj kameloj?
14. Kial la reĝo havis blankajn harojn?
15. Kial la servisto estis malgaja?
16. Kial la prezidanto lasis la libron en la ĝardeno?
17. Kial la reĝo estis pala?
18. Kial li mortis kontenta?

## 26. DUDEK SESA LECIONO

(See Grammar, § 6)

Li estis skribanta. He was writing.

Legante, li revas. While reading he dreams.

Niaj legantoj. Our readers.

Promenante, ili trovis tion ĉi. Walking, they found this.

1. Ĉu vi trovis mian fraton? Jes, mi lin trovis leganta grandan libron.
2. Kion faris via fratino, kiam vi envenis? Kiam mi envenis la ĉambron, ŝi estis skribanta (skribadis) longan leteron.
3. Kiam vi lernas viajn lecionojn? Mi lernas ilin promenante.
4. Kiel tiu knabo vivas? Li vivas instruante kaj verkante.
5. Ĉu vi kantas laborante? Jes, mi tre ofte kantas laborante en la ĝardeno, sed skribi aŭ legi mi ne povus kantante.
6. Kiu estas la plej bona leganto en via lernejo? Tiu ĉi juna lernanto kaj tiu ĉi lernantino estas la du plej bonaj legantoj.
7. Kiom da lernantoj havas tiu profesoro? Li havas tre multajn lernantojn, ĉar li instruas en la urbo kaj ankaŭ tie ĉi.
8. Ĉu vi vidis junajn knabojn kurantaj tra mia ĝardeno? Ne, sinjoro, mi tie vidis nur vian filineton ludanta kun la hundo.
9. Ĉu via kuzo ŝatas ankaŭ ĉokoladon? Ne, sinjoro, li estas granda trinkanto de teo kaj li trinkas nur tion.

10. Kiel vi lernis kalkuladon? Mia fratino ĝin lernis en la lernejo kaj ŝi estis mia instruantino.
11. Kiu estas la plej bona lernantino de tiu profesoro? Mi kredas, ke ĉiuj ŝiaj lernantinoj laboras tre bone.
12. Ĉu vi lernas pli bone legante aŭ aŭdante? Mi pli facile lernas aŭdante, ĉar mi restas ofte longan tempon legante unu libron kaj ĝin ne komprenas.

## 27. DUDEK SEPA LECIONO

(See Grammar, § 6)

**Fininte la taskon.** Having finished the task.**Mi jam estis kaptinta lin.** I had already caught him.**La muso estas mortinta.** The mouse is dead.**La skribinto de tiu paĝo.** The one who has written that page.

1. Ĉu vi jam estas fininta vian laboron? Jes, sinjoro, mi jam tute finis ĝin.
2. Ĉu vi estis jam tagmanĝinta, kiam mia frato alvenis? Jes, ni estis finintaj la tagmanĝon jam de duona horo.
3. Ĉu morgaŭ vi estos fininta? Ne, sinjoro, mi ne estos fininta tiun taskon antaŭ du aŭ tri tagoj, ĉar ĝi estas tre malfacila.



4. Ĉu vi estas malsana? Ne, sinjoro, mi estas nur laca kaj, restinte trankvile kelkajn horojn, mi rekomencos la laboradon.
5. Ĉu via familio estas vespermanĝanta nun? Ne, kara amiko, de longe ni estas finintaj nian manĝon.
6. Kion faris la kato ĝis nun? Li estis kuranta tra la ĉambroj por kapti muson.
7. Kie li estas nun? Nun li estas en la ĝardeno, kaptinte la muson kaj ĝin manĝante.
8. Kiu estas la skribinto de tiuj ĉi vortoj? Mi skribis ilin, sinjoro, antaŭ mallonga momento.
9. Kiel vi trovis mian libron? Promeninte tra la tuta ĝardeno kaj ne trovinte ĝin, ni iris al la dometo de la hundo kaj tie ni ĝin vidis.
10. Kial vi ne venis al ni hieraŭ vespere? Mi ne povis veni, ĉar laborinte ĝis la oka horo, mi estis tro laca kaj eĉ ne estus havinta tempon por iri ĝis via domo.
11. Kiu estas via helpanto en tiu ĉi afero? Sinjoro, mi ne havas helpanton, ĉar mi deziras labori sole.
12. Ĉu vi estas la verkinto de tiu ĉi libro? Jes, sinjoro, mi ĝin verkis kiam mi estis dudekjara.

## 28. DUDEK OKA LECIONO

(See Grammar, § 6)

**Parolonte, li falis.** About to speak, he fell.**La mortontoj vin salutas.** "Morituri vos salutant." Those about to die salute you.**Mi estis forironta.** I was about to go away.

1. Ĉu vi estas jam lasonta la tutan aferon? Jes, morgaŭ mi foriros de tie ĉi.
2. Ĉu vi estas legonta tiun ĉi libron? Ne, mi ĝin ne legos, ĉar mi ne havas tempon.
3. Kiam la kato estis manĝonta la muson? Li estis manĝonta ĝin, kiam li ĝin kaptis.
4. Kiam li estis manĝanta la muson? Li estas manĝanta la muson nun, ĉar li ĝin nun manĝas.
5. Kiam li estos manĝinta la muson? Li estos manĝinta la muson, kiam li estos fininta, post kelkaj minutoj.
6. Ĉu vi jam komencis vian grandan verkon? Ne, mi estas komenonta la proksiman monaton.
7. Kial tiuj homoj estas mortontaj? Ĉar ĉiuj homoj mortos iam; do, kiel vi kaj mi, tiuj homoj estas mortontaj.
8. Ĉu via frato estas unu el la farintoj de tiu ĉi dometo? Ne, sinjoro, sed li certe estus laborinta kun la aliaj knaboj, se li ne estus estinta malsana.

9. Kial vi ne volas trinki tiun ĉi akvon? Ni estis trinkontaj ĝin, kiam ni ekvidis ke ĝi estas tre malpura.
10. Kiel vi trovis la vojon al mia domo? Mi estis promenanta tra tiu ĉi vilaĝo kaj mi vidis vian filon sidanta tie ĉi ĉe la fenestro.
11. Ĉu jam de longe vi estis loĝanta en tiu ĉi vilaĝo antaŭ la morto de via patro? Ne, sinjoro, mia patro estas mortinta de kvin semajnoj, kaj mi alvenis tien ĉi du semajnojn antaŭe.

## 29. DUDEK NAŬA LECIONO

(See Grammar, § 9 and § 10)

- Li riproĉas lin.** He reproaches him.  
**Ŝi donas al ŝi.** She gives to her.  
**Ŝi donas al si.** She gives to herself.  
**Mi riproĉas min.** I reproach myself.  
**Vi riproĉas vin.** You reproach yourself.  
**Ni riproĉas nin.** We reproach ourselves.  
**Li riproĉas sin.** He reproaches himself.  
**Ŝi riproĉas sin.** She reproaches herself.  
**Ĝi riproĉas sin.** It reproaches itself.  
**Ili riproĉas sin.** They reproach themselves.

1. Kion donis via patrino al via fratino? Ŝi donis al ŝi belan libron.
2. Ĉu via fratino nun havas la libron kun si? Ne, ŝi ne havas ĝin kun si, ŝi lasis ĝin hejme.

3. Kial via frato sin riproĉas tiel? Ĉar li estas malgaja, vidante ke lia patro estas tre mal-kontenta pri li.
4. Al kiu parolis via onklo? Li parolas al si; li ofte parolas laŭte, eĉ estante sola.
5. Kiu ne havas sian libron? Mi kredas, ke ĉiuj havas sian libron.
6. Ĉu tiu sinjoro laboras kun sia filo? Jes, li laboras kun sia filo kaj lia helpo estas tre granda al li.
7. Ĉu la patro estas kontenta labori kun sia filo? Mi kredas, ke li amas multe sian filon kaj multe ŝatas lian laboron.
8. Kun kiu parolas viaj gepatroj? Ili parolas kun sia malnova amikino kaj ŝia edzo.
9. Ĉu via frátino laboras bone en la lernejo? Mi kredas, ke la instruistino estas kontenta pri ŝia laboro en siaj lecionoj.
10. Ĉu vi konas tiun vilaĝon kaj ĝiajn stratojn? Ne, mi ne konas tiun vilaĝon, sed mia onklo loĝas tie, kaj li konas sian vilaĝon kaj ĝiajn stratojn.
11. Ĉu li riproĉis sian fraton pri tio ĉi? Jes, li riproĉis lin multe, sed li estus farinta pli bone riproĉante ankaŭ sin, ĉar li estis tiel malbona kiel sia frato en tiu ĉi afero.
12. Ĉu via amiko loĝis ĉe sia onklo? Jes, li loĝis ĉe sia onklo sep monatojn, kaj li tre ŝatis lian domon, sed nun li revenis al sia hejmo en la urbo.

## 30. TRIDEKA LECIONO

(See Grammar, § 12 and § 23)

<b>Konduki</b> , to conduct, to bring.	<b>Sudo</b> , south.
<b>Urbo</b> , city, town.	<b>Nordo</b> , north.
<b>Ĉar</b> , because, for, as.	<b>Parto</b> , part.
<b>Preskaŭ</b> , almost.	<b>Iom</b> , a little, somewhat.
<b>Ĉiam</b> , always.	<b>Timi</b> , to fear.
<b>Neniam</b> , never.	<b>Pro</b> , because of.
<b>Resti</b> , to remain.	<b>Bruĭ</b> , to make noise.
<b>Restado</b> , the staying.	<b>Per</b> , by means of.
<b>Miri</b> , to wonder.	<b>Elektro</b> , electricity.
<b>Mirado</b> , wondering.	<b>Bazaro</b> , bazaar.
<b>Admiri</b> , to admire.	<b>Ludi</b> , to play.
<b>Admirado</b> , a d m i r a - tion.	<b>Ludilo</b> , toy.
<b>Kompreni</b> , to under- stand.	<b>Ligno</b> , wood.
<b>Komprenoble</b> , of course.	<b>Ĉevalo</b> , horse.
<b>Plezuro</b> , pleasure.	<b>Pilko</b> , ball.
<b>Ĝui</b> , to enjoy.	<b>Ĉio</b> , everything.
<b>Veturi</b> , to ride.	<b>Fako</b> , department.
<b>Vagono</b> , car.	<b>Pupo</b> , doll.
<b>Vagonaro</b> , train.	<b>Viro</b> , man (male).
<b>Je</b> , at (indefinite prep- osition).	<b>Virino</b> , woman.
<b>Stacio</b> , station.	<b>Hundo</b> , dog.
	<b>Urso</b> , bear.
	<b>Elefanto</b> , elephant.
	<b>Eĉ</b> , even.
	<b>Aŭ</b> , or.
	<b>Ŝajni</b> , to seem, to look.

<b>Sincera</b> , sincere.	<b>Anaso</b> , duck.
<b>Eniri</b> , to go in.	<b>Cigno</b> , swan.
<b>Eliri</b> , to go out.	<b>Perdi</b> , to lose.
<b>Elekti</b> , to choose.	<b>Ĉapelo</b> , hat.
<b>Pasi</b> , to pass.	<b>Flugi</b> , to fly.
<b>Trans</b> , over.	<b>For</b> , away.
<b>Rivero</b> , river.	<b>Plori</b> , to cry, to weep.
<b>Vento</b> , wind.	<b>Sablejo</b> , beach.
<b>Tuj</b> , at once.	<b>Montri</b> , to show.
<b>Tamen</b> , however.	<b>Katedralo</b> , cathedral.
<b>Demandi</b> , to question.	<b>Turo</b> , tower.
<b>Ankoraŭ</b> , still, yet.	<b>Ŝtupo</b> , step.
<b>Maro</b> , sea.	<b>Ŝtuparo</b> , stairway.
<b>Sablo</b> , sand.	<b>Tial</b> , therefore.
<b>Ponto</b> , bridge.	<b>Re</b> , back, again.
<b>Rigardi</b> , to look at.	<b>Reveni</b> , to come back.
<b>Blua</b> , blue.	<b>Dormi</b> , to sleep.
<b>Akvo</b> , water.	<b>Lito</b> , bed.
<b>Flui</b> , to flow.	<b>Rakonti</b> , to tell, to de- scribe.
<b>Sub</b> , under.	<b>Aĝo</b> , age.
<b>Okulo</b> , eye.	<b>Havi</b> , to have.
<b>Insulo</b> , island.	

## EN LA URBO

Hieraŭ ni kondukis al la urbo nian sepjaran fratineton. Ĉar ŝi estis preskaŭ ĉiam malsana, sur la kamparo ŝi restadis la tutan tempon, kaj neniam antaŭe ŝi estis veninta en la urbon. Estis kompreneble granda plezuro ĉi ŝi, kaj ni ankaŭ multe

ĝuis ŝian infanan miradon kaj admiradon ĉe ĉiu nova afero.

Ni veturis per malrapida vagonaro kaj alvenis je la nova stacio en la suda parto de l'urbo. La stacidomo estas vere bela, sed nia fratineto iom timis pro la granda bruado, kiun ŝi aŭdis tie. De la stacidomo per elektra vagono ni veturis al la granda placo antaŭ la urbodomo.

Ni vizitis tie grandan bazaron, kie oni vendas ludilojn.

Estis tie lignaj ĉevaloj, vagonetoj, pilkoj, kaj tiel plu, sed mia fratineto ne longe haltis antaŭ ĉio; ŝi plej longe restis admirante antaŭ la fako de la pupoj. Estis tie veraj familioj da pupoj, grandaj kaj malgrandaj viretoj, virinetoj, infanoj kaj ankaŭ hundoj, ursoj, eĉ malgrandaj elefantoj. Ĉiuj staris aŭ sidis en beletaj ĉambroj kun tabletoj kaj seĝetoj, kaj ili preskaŭ ŝajnis vivantaj. Mi kredas, ke ni estis admirantaj tiel sincere kiel nia fratineto. Elirante el tiu granda bazaro, ŝi estis iom malgaja, ĉar estis tro multe da aferoj kaj ŝi ne povis elekti.

Irante de tie al la norda parto de la urbo, ni pasis trans la riveron sur la nova ponto. Riveron mia fratino jam ofte estis vidanta, sed neniam ŝi estis pasinta sur tiel granda ponto.

Mia fratino multe ŝatis rigardi la belan bluan akvon rapide fluanta sub ŝiaj okuloj. En la mezo de la rivero estas malgranda insulo, kie loĝas akvo-

birdoj: anasoj kaj oĝnoj. Nia fratineto volinte vidi ilin pli bone, perdis sian ĉapelon, kaj ĝi forflugis pro la vento kaj falis sur la riveron, kiu ĝin rapide forportis malproksimen. La malfeliĉa knabineto multe ploris, sed ni tuj iris kun ŝi al bona butikoj, kie ni aĉetis belan novan ĉapelon kiu tre plaĉis al ŝi. Tamen ŝi ne estis ankoraŭ tute kontenta kaj demandis kien la rivero forportos ŝian malnovan ĉapelon. Ni diris al ŝi, ke la rivero fluas al la granda maro kaj ke eble iam alia knabineto trovos ŝian ĉapelon sur la sablejo kaj pensos pri ŝi.

Post tiu akcidenteto, ni montris al ŝi la katedralon kaj ni supreniris kun ŝi en la plej altan turo. La ŝtuparo havas okcent ŝtupojn, kaj nia fratineto estis baldaŭ laca. Tial ni portis ŝin ĝis la supro. De tie ŝi vidis la tutan urbon, la domojn, la placojn, la stratojn, kaj la multajn homojn, ŝajnantajn ne pli grandaj ol pupetoj. Baldaŭ venis vespero, kaj ni devis reveturi hejmen. Ni alvenis je duono post la sesa kaj, post bona vespermanĝo, nia fratineto, kompreneble tre laca, supreniris al sia ĉambro por dormi. Tre gaje ŝi iris en la liton, rakontinte al sia patrino pri la belaj aferoj, kiujn ŝi vidis, kaj ankaŭ pri la perdo de sia ĉapelo.

#### A. ĈU (WHETHER? YES? OR NO?)

1. Ĉu nia fratino jam estis vidinta urbon? Ne, ŝi ne ankoraŭ estis vidinta urbon, ĉar ŝi restadis ĉiam sur la kamparo.



2. Ĉu vilaĝoj estas pli grandaj ol urboj?
3. Ĉu la urbo plaĉis al nia fratino?
4. Ĉu ŝi restis longe en la bazaro?

### B. KIO (WHAT?)

1. Kion ni vidis sur la placo? La urbodomon ni vidis tie.
2. Kio estas apud la urbodomo?
3. Kio estas en la rivero?
4. Sur kio oni transpasas la riveron?

### C. KIU (WHO? or WHICH?)

1. Kiun ni kondukis al la urbo? Nian junan fratinton ni kondukis tien.
2. Kiun aĝon ŝi havas? Ŝi estas nur sepjara.
3. Kiu vespermanĝis kun ŝi?
4. Al kiu ŝi rakontis pri sia vizito al la urbo?

### D. KIE (WHERE?)

1. Kie estas la bazaro? Ĝi estas sur la placo antaŭ la urbodomo.
2. Kien ni veturis? Ni veturis al la sudurba stacio.
3. Kie ni vidis pupojn?
4. Kie ni vidis insulon?

## E. KIAM (WHEN?)

1. Kiam ni vizitis la urbon? Hieraŭ ni ĝin vizitis.
2. Kiam ploris nia fratineto? Perdinte sian ĉapelon, ŝi ploris.
3. Kiam ni vizitis la katedralon?
4. Kiam ni revenis hejmen?

## F. KIAL (WHY?)

1. Kial nia fratino restadis sur la kamparo? Ŝi restadis tie, ĉar ŝi estis malsana.
2. Kial mia fratino ploris?
3. Kial ŝi estis laca?
4. Kial ŝi bone dormis?

## G. KIEL (HOW?)

1. Kiel ni veturis al la urbo? Per vagonaro ni veturis tien.
2. Kiel ni ĝuis tiun tagon? Ni ĝin tre multe ĝuis.
3. Kiel ni supreniris al la supro de la katedralo?
4. Kiel ŝajnis la homoj malsupre en la stratoj?

## H. KIOM DA (HOW MANY? HOW MUCH?)

1. Kiom da fratinoj ni havas? Ni havas nur unu fratilon.
2. Kiom da ŝtupoj havas la ŝtuparo?

3. Kiom da vagonoj havis nia vagonaro?
4. Kiom da tempo ni restis en la urbo?

### 1. MIXED QUESTIONS

1. Kien ni kondukis hieraŭ nian fratinton?
2. Kiun aĝon ŝi havas?
3. Ĉu ŝi jam estis vizitinta la urbon?
4. Kial ŝi neniam antaŭe venis al la urbo?
5. Je kiu stacio ni alvenis per la malrapida vagonaro?
6. Kial mia fratino timis ion en la stacio?
7. Kien ni tuj veturis?
8. Ĉu ni veturis tien per vagonaro?
9. Kion ni vizitis sur la placo?
10. Kion oni vendas en tiu bazaro?
11. Kio plej multe plaĉis al nia fratineteto?
12. Kie sidis la pupoj?
13. Kiel ŝajnis tiuj pupoj?
14. Ĉu nia fratino vidis nur pupojn en la bazaro?
15. Kiu ankaŭ admiris la ludilojn?
16. Kial mia fratino ne estis tute gaja elirante el la bazaro?
17. Kion ni vizitis poste?
18. Sur kio ni pasis?
19. Ĉu nia fratineteto jam estis pasinta sur granda ponto?

20. Ĉu ŝi timis?
21. Kion ŝi rigardis?
22. Kio estas en la mezo de la rivero?
23. Kiu birdoj loĝas sur la insuleto?
24. Kiu rigardis la birdojn?
25. Kio falis en la riveron?
26. Ĉu ni povis rekapti la ĉapelon?
27. Kien la rivero forportis la ĉapelon?
28. Ĉu nia fratino estis kontenta?
29. Kion ni aĉetis tuj?
30. Kie ni aĉetis la novan ĉapelon?
31. Kiu eble trovos la malnovan ĉapelon?
32. Kien fluas la rivero?
33. Ĉu nia fratino jam vidis la maron?
34. Kien ni supreniris kun ŝi?
35. Ĉu ŝi povis marŝi sur la okcent ŝtupoj?
36. Kiu portis ŝin?
37. Kion ŝi vidis, kiam ŝi estis supre?
38. Ĉu ŝi vidis homojn en la stratoj?
39. Kiam ni malsupreniris?
40. Al kiu stacio ni iris?
41. Je kioma horo ni revenis hejmen?
42. Kiel ni vespermanĝis?
43. Kiu iris baldaŭ al la lito?
44. Kiu aŭdis la belajn rakontojn de nia fratinetō?

31. TRIDEK UNUA LECIONO

(See Grammar, § 7)

**La muso estas nun manĝata de la kato.** The mouse is now being eaten by the cat.

**Li estos ĉiam helpata de ni.** He will always be helped by us.

**Ordonate de li, ili neniam bone laboris.** Commanded by him, they never worked well.

1. **Kiam la muso estas manĝata?** Ĝi estas manĝata kiam la kato manĝas ĝin.
2. **Ĉu vi laboris sole hieraŭ?** Ne, sinjoro, de mia amiko Paŭlo mi estis helpata la tutan vesperon.
3. **Kiu estis riproĉata de la instruisto hodiaŭ matene?** La filo de l'kombisto estis riproĉata.
4. **Kial li estis riproĉata?** La instruisto lin riproĉis, ĉar aŭskultante la lecionon, li estis manĝanta bombonojn la tutan horon.
5. **Kie estas trinkata la plej bona teo en via urbo?** Mi kredas, ke vi povos trinki la plej bonan teon en la granda tevendejo sur la placo de l'urbodomo.
6. **Ĉu viaj gepatroj estis jam vizitataj de mia frato?** Ne, sinjoro, via frato neniam venis al ili.

7. De kiu la knabinoj estos instruataj, se la instruistino forveturos? Mi kredas, ke oni facile trovos alian instruistinon.
8. Kie estis trovataj tiuj ĉi du libroj? Ŝajnas al mi, ke ili estis trovataj sur via tablo.
9. Kiel vi ŝatis la kantadon de mia nevino? Mi ĝin tre ŝatis, sed ŝajnis al mi, ke la du lastaj kantoj estis tro rapide kantataj.
10. Ĉu vi ricevis multan helpon, dum vi faris vian grandan laboron? Ne, sinjoro, mi estis helpata nur de mia knabeto.
11. Ĉu viaj du filoj faris tiun ĉi laboron? Jes, sinjoro, sed ĉar la pli juna laboras multe pli bone ol sia frato, li estis la ordonanto kaj lia frato la ordonato.
12. Kiel vi estis ricevata? Mi estis tute ne ricevata.

## 32. TRIDEK DUA LECIONO

(See Grammar, § 7)

**Kiu estas helpita?** Who has *been* helped?**Neniu estis pagita.** No one had *been* paid.**Nenio estos perdita.** Nothing shall have *been* lost.**La vunditoj estos forportataj.** The wounded will be brought away.**La kastelo ne estas jam konstruita.** The castle is not yet built.

1. Kiel tiuj ĉi homoj estas vunditaj? Ili estas vunditaj de granda ŝtono falinta de tiu domo.
2. Ĉu ĝi estas nove konstruita domo? Ne, mi kredas, ke ĝi estas jam konstruita de multaj jaroj.
3. Ĉu via laboro estis jam finita lastan jaron? Jes, sinjoro, sed mi ĝin perdis kaj devis ĉion rekomenci.
4. Kiom estas pagata via frato? Mi kredas, ke li ne ricevas grandan pagon.
5. Ĉu ĉiuj estas nun pagitaj? Ne, sinjoro, du homoj restas ankoraŭ ne pagite.
6. Kio estas perdita? Mia ĉapelo estas perdita, sed mi ĝin retrovos.
7. Ĉu via kuko estas jam tute manĝita? Jes, la knaboj ĝin tute manĝis.
8. Kiam tiu ĉi domo estis konstruita? Ĝi estis komencata antaŭ kvin jaroj kaj finita antaŭ tri jaroj.
9. Ĉu vere ĝi estis konstruata dum du tutaj jaroj? Jes, sed oni preskaŭ ne laboris la du vintrojn.
10. Kiel estas skribita via tasko? Mi timas, ke vi ĝin trovos tre malbone skribita, ĉar ĝi estis skribata tre rapide.
11. Kial vi estas ĉiam helpata de via fratino? Ĉar mi ne povas labori sole, kaj ŝi estas la sola persono de kiu mi estas ĉiam bone komprenata.

12. Ĉu via verko estis bone deklamata? Ne, sinjoro, kaj mi suferis aŭdante ĝin deklamata de tiu ĉi lernanto.

## 33. TRIDEK TRIA LECIONO

(See Grammar, § 7)

**La muso estas manĝota de la kato.** The mouse is about to be eaten by the cat.

**La aĉetota vesto.** The coat that shall be bought.

**Iu frapis.** Some one knocked.

**Iu ajn povus.** Any one could.

**Kiam ajn vi deziras.** Whenever you wish.

**Ie.** Somewhere. **Ie ajn.** Anywhere.

1. Ĉu tiu kuko estas manĝota? Ne ĝi estas nur rigardota.
2. Kien vi metos la ricevotajn leterojn? Mi metos la ricevotajn leterojn tien, kie jam estas la ricevitaj.
3. Kien vi iros la venontan someron? Mi iros ien ajn, kie mi povos esti trankvila.
4. Kie vi plej facile laboras? Kie ajn mi estas, mi gaje laboras, se mi estas trankvila.
5. Ĉu iu ne frapis? Jes, mi aŭdis brueton, ŝajnas al mi.
6. Kiuj estas la vizitotaj personoj? Mi kredas, ke ni ne havos tempon iun viziti.



7. Ĉu vi vidis iun en mia ĝardeno? Ne, sinjoro, sed iu ajn povus eniri nevidate.
8. Kiel iu povus eniri, dum vi estas tie? Sinjoro, mi laboras tie sur la arbo, kaj mi ne povas ĉiam rigardi tra la tuta ĝardeno.
9. Kiel mia ŝleto lernas kalkuladon? Tre bone, sinjoro, kaj mi povas diri vere, ke li bone lernas kion ajn li komencas.
10. Kiu aĉetis tiun ĉi veston? Mia frato ĝin aĉetis, sed ĝi estas tro malgranda kaj li ne povas ĝin surmeti.
11. Kie vi aĉetis vian bluan veston? Ie en la urbo; sed mi ne povus diri en kiu vendejo.
12. Ĉu vi povas ofte viziti vian fraton? Jes, mi lin vizitas kiam ajn plaĉas al mi.
13. Kie vi deziras loĝi tiun ĉi nokton? Ie ajn, kie mi povos trankvile dormi, ĉar mi estas tre laca.
14. Ĉu vi iam vidis vian fraton ploranta? Ne, mi kredas, ke li tute ne povus plori, eĉ se li ĝin dezirus.

### 34. TRIDEK KVARA LECIONO

(See Grammar, § 25)

**Li preferas babili.** He prefers to chatter.

**Estas necese atenti.** It is necessary to listen.

**Li laboras por gajni monon.** He works to earn money.

**Li laboras por si.** He works for himself.

**Ne uzante ĝin.** Without using it.

**Supozante tion.** In supposing that.

**Rifuzante lian proponon.** By refusing his offer.

1. Kial vi eliris el via ĉambro? Ĉar mi deziris vespermanĝi kun mia patro.
2. Kial vi ne laboras en via domo? Mi ne laboras tie, por ne fari bruon, dum mia patrino estas malsana.
3. Kial vi kuris tiel rapide? Ĉar mi deziris alveni ĝustatempe por la leciono.
4. Por kiu vi aĉetis tiun malgrandan libron? Mi ĝin aĉetis por iu, kiun vi ne konas.
5. Kiel vi lernis tiel rapide? Mi ĝin faris uzante bonan lernolibron.
6. Ĉu tiuj laboristoj estas bone pagataj? Ne, sinjoro, mi kredas, ke oni malbone pagas ilin.
7. Kien kuras tiu ĉi knabeto ĉiuvespere je la kvina? Mi supozas, ke li iras aĉeti panon por sia patrino.
8. Kial vi supozas tion? Ĉar mi lin jam vidis portanta panon je tiu horo.
9. Kiam vi vidis lin? Mi ne povas diri ĝuste la tagon; ĝi estis antaŭ kelkaj semajnoj.
10. Ĉu vi konas lian familion? Ne, sed mia fratino konas ĝin, kaj ŝi ofte diris al mi, ke ili estas tre bonaj homoj.

11. Kiel ŝi ekkonis ilin? Ŝi ekkonis la patrinnon kiam ŝi estis vundita de la akcidento sur la ponto lastan jaron.
12. Ĉu ŝi estis grave vundita? Jes, oni longe timis ke ŝi mortos,<sup>1</sup> sed nur post kvar monatoj ŝi povis eliri el la lito.
13. Kion faras la patro? La patro estas helpanto en granda papervendejo.
14. Kie estas tiu butikoj? Ĝi estas norde en la urbo, sur la dekseca strato.

### 35. TRIDEK KVINA LECIONO

(See Grammar, § 38, suffix -IG)

<b>Akompani</b> , accompany.	<b>Plena</b> , full.
<b>Legomo</b> , vegetable.	<b>Lui</b> , to rent.
<b>Ĉio</b> , everything.	<b>Loko</b> , place.
<b>Speciala</b> , special.	<b>Trotuaro</b> , pavement.
<b>Sufiĉa</b> , sufficient.	<b>Meti</b> , to put.
<b>Sufiĉe</b> , enough.	<b>Korbo</b> , basket.
<b>Devi</b> , to have to, must.	<b>Ŝirmi</b> , to protect.
<b>Marŝi</b> , to walk.	<b>Kontraŭ</b> , against.
<b>Promeni</b> , to take a walk.	<b>Pluvas</b> , it rains.
<b>Kampo</b> , field.	<b>Suno</b> , sun.
<b>Kamparo</b> , country.	<b>Granda</b> , large.
<b>Frue</b> , early.	<b>Grandega</b> , immense.
<b>Veturilo</b> , carriage.	<b>Ombrello</b> , umbrella.

<sup>1</sup> Rimarku la logikan tempon de la verbo "mortos."

<b>Frukto</b> , fruit.	<b>Brasiko</b> , cabbage.
<b>Piro</b> , pear.	<b>Speco</b> , sort, kind.
<b>Pomo</b> , apple.	<b>Fromaĝo</b> , cheese.
<b>Pruno</b> , plum.	<b>Freŝa</b> , fresh.
<b>Verda</b> , green.	<b>Prezo</b> , price, cost.
<b>Ruĝa</b> , red.	<b>Diskuti</b> , to discuss.
<b>Flava</b> , yellow.	<b>Largâ</b> , wide.
<b>Blua</b> , blue.	<b>Momento</b> , moment.
<b>Nigra</b> , black.	<b>Antaŭen</b> , forward.
<b>Blanka</b> , white.	<b>Amuzi</b> , to amuse.
<b>Lasta</b> , last.	<b>Premi</b> , to grasp, to press.
<b>Dika</b> , thick.	<b>Perdiĝi</b> , to get lost.
<b>Mordi</b> , to bite.	<b>Laciĝi</b> , to get tired.
<b>Kosti</b> , to cost.	<b>Fiera</b> , proud.
<b>Funto</b> , pound.	<b>Kuiri</b> , to cook.
<b>Penco</b> , penny.	<b>Kuirejo</b> , kitchen.
<b>Rikolti</b> , to harvest.	<b>Supo</b> , soup.
<b>Mano</b> , hand.	<b>Friti</b> , to fry.
<b>Inter</b> , between.	<b>Memori</b> , to remember.
<b>Sako</b> , sack.	<b>Kvankam</b> , although.
<b>Terpomo</b> , potato.	<b>Sed</b> , but.
<b>Amaso</b> , crowd, pile.	

### POR LA TAGMANĜO

Mia juna kuzo rakontis al mi, ke hieraŭ li akompanis sian patrinon al la legomvendejo. Tio tre plaĉis al li, ĉar li estas ankoraŭ knabeto kaj ŝatas ĉion ajn, kio estas por li nova, kaj speciale ĉion,

kio estas brua. Preskaŭ ĉiuj infanoj ŝatas la brua-  
 don kaj, ĉe la legomvendejo, mia kuzo aŭdis sufiĉe  
 da ĝi. Li devis kureti la tutan tempon, ĉar mia  
 onklino marŝas tre rapide. En nia urbo la legom-  
 vendejo estas sur la granda placo kaj sur du apudaj  
 stratoj. Centoj da viroj kaj virinoj de la kamparo  
 alvenas tien, ĉiuvendrede frue en la mateno, kun  
 plenaj veturiloj. Ĉiu luas specialan lokon sur la  
 trotuaro, kaj ili metas tien siajn tablojn kaj siajn  
 korbojn. Por esti ŝirmataj kontraŭ la pluvo kaj  
 la suno, ili havas ofte grandegajn ombrelojn.

Mia onklino haltis unue ĉe vendistino de fruktoj.  
 Ŝi deziris aĉeti pirojn. Sur la trotuaro kuŝis dekdu  
 korbegoj kun belaj ruĝaj pomoj, verdaj pometoj,  
 prunoj flavaj, ruĝaj kaj bluaj, fine en la tri lastaj  
 korboj estis belaj piroj, dikaj kaj belŝajnaj. Jam  
 mia kuzeto estus dezirinta mordi je unu el ili, se  
 li estus restinta tro longe tie. “Kiom kostas tiuj  
 ĉi?” demandis mia onklino. “Unu funton po ses  
 pencoj, kara sinjorino; kiom da funtoj vi prenos?”  
 Mia onklino ne estis kontenta. “Tro kare vi vendas  
 viajn pirojn, mi ne donos pli ol kvar pencojn por  
 unu funto.” “Ne eble,” kriis la virino, “ne eble!  
 Tro malbona estis la rikolto—” sed mia onklino  
 jam estis preninta la manon de sia fileto kaj irinta  
 pli malproksimen. Ambaŭ promenadis inter la  
 sakoĵ da terpomoj, amasoj da brasikoj, tabloj kun  
 ĉiuj specoj da fromaĝoj. La gevendistoj kriadis:  
 “Terpomoj, la plej bonaj, tute freŝaj!—ovoj,

fruktoj! venu tien ĉi! Aliloke vi ne trovos tiel bonajn—” Amaso da homoj, speciale sinjorinoj kaj servistinoj, trapasadis babilante, demaudante pri la prezoj, diskutante tie kaj tie ĉi. La tro-  
 tuaroj ne estis sufiĉe larĝaj por ĉiuj, kaj sur la strato la elektraĵ vagonoj devis halti ĉiumomente kaj, kvankam iliaj sonoriloj sonoradis la tutan tempon, ili ne povis rapide antaŭeniri. Mia kuzeto estis tre amuzata de ĉio, sed li forte premis la patrinan manon por ne perdiĝi. Ĉe diversaj lokoj mia onklino aĉetis la legomojn kaj fruktojn deziritajn kaj, kiam ŝi laciĝis de la bruado kaj marŝado, ŝi reiris hejmen kun la fileto ĝoje kuretanta kaj tre fiere portanta papersakon da piroj.

Alveninte hejmen, mia onklino portis ĉion en la kuirejon kaj diris al la kuirstino, kion ŝi devas kuiriri por la tagmanĝo. Ŝi devis fari supon, frititajn terpomojn kaj multajn aliajn aferojn, kiujn mia kuzeto ne memoras, kvankam li plezure manĝis ilin.

## QUESTIONS

**Ĉu?** Whether? Yes? or No?

**Kiu?** Who? Which?

**Kio?** What?

**Kiam?** When?

**Kie?** Where?

**Kial?** Why?

**Kiel?** How?

**Kiom da?** How much? How many?

1. Kiu iris al la legomvendejo?
2. Kiu akompanis mian onklinon?
3. Kiam ili iris tien?
4. Kial ĝi plaĉis al mia kuzeto?
5. Ĉu la infanoj ŝatas bruadon?
6. Ĉu legomvendejo estas tre trankvila?
7. Kiu devis kureti?
8. Ĉu la onklino marŝas pli rapide ol sia fileto?
9. Kie estas la legomvendejo?
10. Kiu alvenas tien ĉiuvendrede?
11. Kion alportas la vendistoj?
12. Kiel ili alportas ĉiujn fruktojn?
13. Kien ili metas siajn korbojn?
14. Ĉu ili havas tablojn?
15. Kio ŝirmas ilin kontraŭ la pluvo kaj la suno?
16. Ĉu tiuj ombreloj estas ruĝaj?
17. Kion mia onklino deziris aĉeti?
18. Ĉu vi pli ŝatas prunojn ol pomojn?
19. Ĉu mia onklino aĉetis brasikon?
20. Kial ŝi ne aĉetis pirojn de la unua vendistino?
21. Ĉu ŝi trovis virinon, kiu vendis pli malkare siajn pirojn?
22. Kiom kostas unu funto da prunoj?
23. Ĉu kiu sezono oni faras la rikolton?
24. Ĉu la onklino aĉetis fromaĝon?

25. Kiu venas al la legomvendejo plej ofte?
26. Ĉu estis multaj homoj sur la stratoj?
27. Kio sonoradis la tutan tempon?
28. Kial ne povis la stratvagonoj antaŭeniri rapide?
29. Kiam la onklino revenis hejmen?
30. Kion ŝi estis aĉetinta?
31. Ĉu mia kuzeto perdiĝis?
32. Ĉu li bone amuziĝis?
33. Kion li portis por sia patrino?
34. Al kiu ili donis ĉion, alveninte hejmen?
35. Ĉu la familio plezure tagmanĝis?
36. Kiu plej multe ŝatis la frititajn terpomojn?

## 36. TRIDEK SESA LECIONO

(See Grammar, § 34)

**Ĉu vi konas mian amikon?** Do you know my friend?

**Ĉu vi scias, ke li venis?** Do you know that he came (had come)?

**Mi tute ne konas tiun ŝipon.** I don't know that boat at all.

**Kiu scias ĉu ŝi alvenis?** Who knows whether she has arrived?

**Mi scias pri li, sed ne konas lin.** I know of him, but don't know him.



1. Ĉu vi konas tiun ludon? Ne, sinjoro, mi aŭdis pri ĝi, sed mi ne scias kiel oni ludas ĝin.
2. Ĉu vi trovis tiun sinjoron ĉe la stacio? Ne, mi lin ne trovis; vi scias, ke mi lin ne bone konas.
3. Kiam vi ekkonis mian fraton? Mi ne scias ĝuste kiam mi lin ekkonis; mi nur scias, ke mi lin de tre longe konas.
4. Ĉu vi scias kiam mia patro alvenos morgaŭ? Ne, mi scias nenion pri ĝi.
5. Kiam li komencis sian vojaĝadon? Mi ne scias ĉu li ĝin jam komencis.
6. Kial vi legas tiom da libroj? Ĉar mi deziras bone koni tion, pri kio mi parolas.
7. Ĉu vi jam scias pri kio vi devas paroladi morgaŭ? Ne, mi ekscios ĝin nur momenton antaŭ la vespermanĝo.
8. Kiel vi eksciis pri la alveno de mia frato? Mi antaŭ tre longe aŭdis vin parolanta pri tio.
9. Ĉu vi ankaŭ sciis ke mia fratino liu akompanos? Ne, mi tute ne sciis pri tio.
10. Kion vi scias, juna homo? Mi lernis multajn aferojn, kaj ŝajnas tamen al mi, ke mi scias nenion.
11. Ĉu vi scias kiel oni devas labori tie ĉi? Jes, mi scias pri tio per amiko, kiu laboris ĉe vi.

## 37. TRIDEK SEPA LECIONO

(See Grammar, § 38, suffix -IG)

**Mi grandigas ĝin.** I enlarge it.**Li beligis ĝin.** He has beautified it.**Sciigu min.** Let me know.**Lernigu ŝin.** Make her learn.**Plena, full.**

1. Kion vi faris la tutan matenon? Mi plenigis tiujn sakojn je pomoj kaj piroj.
2. Ĉu estas ankoraŭ akvo en tiu ĉi glaso? Ne, mi ĝin malplenigis antaŭ mallonga momento.
3. Kiu sciigis vin pri mia vizito? Per kelkaj vortoj en via lasta letero vi supozigis al mi, ke vi venos baldaŭ.
4. Kion petis iam la reĝo de Persujo de siaj amikoj profesoroj? Li petis, ke ili mallongigu sian historion.
5. Kio kredigis al vi, ke li estas<sup>1</sup> mortinta? Lia silento min igis kredi tion, ĉar de unu jaro mi nenion aŭdis de li kaj ankaŭ nenion pri li.
6. Kial vi revenigis lin tiel rapide? Ĉar mi ne deziris, ke li restu pli longe kie li estis.
7. Kiu vidigis al vi la belan domon de tiu sinjoro? Mia patrino ĝin vidigis al mi.
8. Kio ŝin malsanigis? Tro granda laborado kaj maldormado ŝin malsanigis.

<sup>1</sup> Rimarku la logikan tempon "estas."

9. Kial vi ne enirigis mian amikon? Mi ne sciis ke li estas tie ĉi.
10. Ĉu li ne sonorigis la sonorilon? Eble li tion faris, sed mi ĝin ne aŭdis.
11. Kie vi estis ĝis nun? Ĝis nun mi estis en la manĝoĉambro puriganta la tablon.
12. Kiu malpurigis la tablon? La infanoj, manĝante fruktojn, ĝin malpurigis.

### 38. TRIDEK OKA LECIONO

(See Grammar, § 38, suffix -IĜ)

**Ni maljuniĝas.** We become old.

**Ŝi grandiĝas.** She grows up.

**Nenie li vidiĝas.** He shows himself nowhere.

**Tial ŝi malsaniĝis.** Therefore she got sick.

**Ili ambaŭ mortigis.** They both got killed.

**Falante de la monto.** (In) falling from the mountain.

1. Kiu mortigis tiun ĉi birdon? Neniu ĝin mortigis, sinjoro.
2. Ĉu ĝi estas mortigita de akcidento? Jes, sinjoro, ĝi mortigis falante de sia kaĝo.
3. Kie mortis via alia birdo? Ĝi malsaniĝis manĝinte tro multe, kaj ĝi mortis la morgaŭan tagon.

4. Kien vi metos tiun ĉi? Ni ĝin enterigos en la ĝardeno, kie jam kuŝas la alia; sed mi tre malgajiĝas pensante ke mi perdis ambaŭ miajn birdetojn.
5. Kiel vi tiel malpuriĝis? Mi laboris en la ĝardeno kaj malpuriĝis falante sur la teron.
6. Kiu troviĝis en la ĉambro kiam mia onklino envenis? Neniu troviĝis tie, ĉar ĉiuj estis jam elirintaj.
7. Kial via patro estas tiel gaja de kelkaj tagoj? Li eksciis pri la baldaŭa veno de siaj generoj, kaj li ŝajnas rejuniĝi nur pensante pri ĝi.
8. Kiel fariĝis via ĝardeneto dum la hieraŭa pluvego? Mia ĝardeno estis tute malbonigata kaj tute pleniĝis je akvo.
9. Kiel laboras nun via amiko? Li povas nun labori pli bone, ĉar lia dumonata restado sur la monto lin resaniĝis kaj refortigis.
10. Ĉu via fratino resaniĝis? Jes, ŝia sano multe pliboniĝis la lastajn monatojn.

## 39. TRIDEK NAŬA LECIONO

(See Grammar, § 28)

**Jam.** Already.**Ankoraŭ.** Still, yet.**Li jam ne povas skribi.** He can write no more.

**Li ne ridos plu.** He will laugh no longer.

**Ne ploru plu.** Cry no more.

**Ili ne jam foriris.** They did not go away yet.

**Ili ankoraŭ ne forprenis ĝin.** They have not yet taken it away.

**Mi forestos.** I shall be away.

1. Ĉu vi ne prenis jam vian leteron? Ne, sinjoro, mi ankoraŭ ĝin ne forprenis de la tablo.
2. Ĉu vi ĉiam instruados en tiu ĉi lernejo? Ne, sinjoro, mi ne instruos plu en ĝi post kvar monatoj, ĉar mi tiam forlasos la urbon.
3. Ĉu via amiko Paŭlo estas ĉiam bona helpanto al vi? Ne plu, sinjoro; li jam ne helpas min de pli longe ol unu jaro.
4. Kial li vin ne helpas plu? Mi supozas, ke li trovis alian laboron, kiu pli plaĉas al li ol tiu, kiun li faris tie ĉi.
5. Kiu ankoraŭ ne ricevis sian pagon? Sinjoro, tiu ĉi homo ankoraŭ ne ricevis pagon por siaj du lastaj laborsemajnoj.
6. Kial li ne ricevis ĝin kiel la aliaj? Li forestis la du pagtagojn estante malsana, kaj nun li jam ne povas pagi siajn kalkulojn al la panisto kaj la aliaj vendistoj.
7. Kion ni devos fari morgaŭ? Vi devos veni kun mi al la urbo; sed ne marŝu plu kiel infanoj ektimantaj ĉe ĉiu veturilo aŭ stratvaĝono.

8. Kion vi ricevis de via avo por la novjaro? De li mi jam de longe nenion ricevas plu por la novjaro, ĉar mi jam ne estas infano.
9. Kiel vi sanas, sinjoro? Mi ne sanas plu tiel bone kiel antaŭe, ĉar maljuniĝante mi perdas ĉiutage iom da forto.
10. Ĉu mi devas forpreni nun mian ĉapelon? Ne, sinjoro, tio ankoraŭ ne estas necesa.

## 40. KVARDEKA LECIONO

<b>Vulpo</b> , fox.	<b>Mi petas</b> , I beg (= please).
<b>Cikonio</b> , stork.	
<b>Iam</b> , once, some day.	<b>Jen estas</b> , here is.
<b>Renkonti</b> , to meet.	<b>Simpla</b> , simple.
<b>Inviti</b> , to invite.	<b>Supo</b> , soup.
<b>Kolo</b> , neck.	<b>Porti</b> , to carry.
<b>Plezuro</b> , pleasure.	<b>Alporti</b> , to bring.
<b>Oni</b> , one (pron.).	<b>Plado</b> , plate.
<b>Flugi</b> , to fly.	<b>Per</b> , with, by means of.
<b>Hejmo</b> , home.	<b>Lango</b> , tongue (body).
<b>Ruza</b> , cunning.	<b>Gluti</b> , to swallow.
<b>Ĝojo</b> , joy.	<b>Beko</b> , beak.
<b>Honoro</b> , honour.	<b>Povi</b> , to be able.
<b>Sidi</b> , to sit.	<b>Kapti</b> , to catch.
<b>-iĝ</b> (see § 38).	<b>Eĉ</b> , even.
<b>Peti</b> , to beg.	<b>Guto</b> , drop.

<b>Ĉar</b> , because.	<b>Pensi</b> , to think.
<b>Tro</b> , too, too much.	<b>Riĉa</b> , rich.
<b>Plata</b> , flat.	<b>Bona</b> , good.
<b>Kontenta</b> , pleased, glad.	<b>Bonega</b> , excellent.
<b>-ec</b> , quality (see § 38).	<b>-eg</b> (see § 38).
<b>-ad</b> , duration (see § 38).	<b>Ripozi</b> , to rest.
<b>Montri</b> , to show.	<b>Sata</b> , satiated.
<b>Ŝerci</b> , to joke.	<b>Malsata</b> , hungry.
<b>Gaja</b> , gay.	<b>Ĝusta</b> , exact.
<b>Fini</b> , to end.	<b>Kia</b> , what a, what kind of.
<b>Ĉiam</b> , always.	<b>Surprizo</b> , surprise.
<b>Sola</b> , alone.	<b>Ekkrii</b> , to exclaim.
<b>Danki</b> , to thank.	<b>-ek</b> (see § 38).
<b>Certa</b> , sure.	<b>Fermi</b> , to shut.
<b>Atendi</b> , to wait for, to expect.	<b>Preta</b> , ready.
<b>Respondi</b> , to answer.	<b>Odoro</b> , odour.
<b>Adiaŭ</b> , good-bye, fare- well.	<b>Rosti</b> , to roast.
<b>Ĝis</b> , until.	<b>Pasi</b> , to pass.
<b>Ĝis revido</b> , au revoir.	<b>Flari</b> , to smell.
<b>Antaŭ</b> , before.	<b>Ambaŭ</b> , both.
<b>Post</b> , after.	<b>Viando</b> , meat.
<b>Laca</b> , tired.	<b>Alta</b> , high, tall.
<b>Ĉasi</b> , to chase, to hunt.	<b>Porcelano</b> , porcelain.
<b>Koko</b> , rooster.	<b>Vazo</b> , vase.
<b>Kokino</b> , hen.	<b>Klara</b> , clear.
<b>Kokido</b> , chick.	<b>Klarigi</b> , to explain.
<b>-id</b> (see § 38).	<b>-ig</b> (see § 38).
	<b>Delikata</b> , delicate.

<b>Ornami</b> , to decorate.	<b>Atingi</b> , to reach.
<b>Ornamajo</b> , ornament.	<b>Vana</b> , vain.
<b>-aj</b> (see § 38).	<b>Provi</b> , to try.
<b>Donaci</b> , to present, to give.	<b>Meti</b> , to put.
<b>Mem</b> , self.	<b>Nazo</b> , nose.
<b>Pala</b> , pale.	<b>Truo</b> , hole.
<b>Honti</b> , to be ashamed.	<b>Dum</b> , while.
<b>Largâ</b> , wide.	<b>Urĝi</b> , to be urging.
<b>Tiel . . . , ke</b> , so . . . that.	<b>Kolera</b> , angry, cross.
	<b>Ridi</b> , to laugh.
	<b>Nokto</b> , night.

### LA VULPO KAJ LA CIKONIO

Sinjoro Vulpo iam renkontis sur la strato Fraŭlinon Cikonion kaj invitis ŝin por vespermanĝo. La longkola fraŭlino akceptis plezure, kaj vespere ŝi alflugis la hejmon de la ruza invitinto. La vulpo ŝin tre afable ricevis: "Ho, fraŭlino, kiel mi estas ĝoja vidi vin tie ĉi. Vi vere faras al mi tre grandan honoron. Sidiĝu, fraŭlino, mi petas, jen estas seĝo." La vespermanĝo estis simpla. Supo estis alportata sur granda plado. La vulpo per sia lango englutis la tutan supon rapide, sed la cikonio per sia longa beko ne povis kapti eĉ unu guton da supo, ĉar la plado estis tro plata.

Ŝi estis tre malkontenta, sed ne montris sian malkontentecon. Ŝi paroladis kaj ŝercadis gaje, kaj eĉ la fino de l'vespero, ŝi diris al la vulpo: "Kara



sinjoro, mi estas ĉiam sola hejme, kaj tio ne estas tre gaja. Ĉu vi farus al mi la grandan plezuron tagmanĝi morgaŭ kun mi? Vi estis tiel afabla al mi, ke mi tre deziras ricevi vin ankaŭ en mia hejmo.”

La vulpo tre ĝojis: “Mil dankojn, fraŭlino, certe mi venos kun la plej granda plezuro. Je kioma horo?”

“Je la unua posttagmeze, mi atendos vin,” respondis la eikonio kaj ŝi adiaŭdiris: “Ĝis revido.”

La postan tagon, la vulpo ripozis la tutan matenon. “Kial mi laborus kaj laciĝus ĉasante kokinojn?” li pensis, “la eikonio estas riĉa kaj mi certe havos bonegan manĝon.”

Tre malsata, li alvenis al la hejmo de la eikonio jam duonan horon antaŭ la ĝusta tempo. “Ho, kia surprizo,” ekkriis la eikonio, malfermante la pordon, “mi tre ĝojas ke vi venis tiel frue; la tagmanĝo estas tute preta.”

Bonan odoron de rostita viando flaris la vulpo kun antaŭĝojo. Ambaŭ sidiĝis ĉe bela tableto kaj oni alportis la viandon. Ĝi estis en granda, alta porcelana vazo kun la plej delikataj ornamatoj. “Tiu ĉi vazo devenas de malproksima lando,” klarigis la eikonio, “kuzino mia ĝin al mi donacis; ekmanĝu, Sinjoro Vulpo, ekmanĝu; mi mem rostis la viandon.”

Sed jam la vulpo pala kaj hontanta sidis malgaje: La kolo de la vazo estis tiel mallarĝa kaj

longa, ke li ne povis atingi la viandon, kaj li vane provis enmeti sian nazegon en la truon de l'vazo.

Dume, la eikonio per sia longa beko rapide manĝis la tutan viandon. La vulpo ne atendis la finon de l'tagmanĝo. Li diris: "Pardonu min, fraŭlino, sed mi havas gravan aferon tre urĝantan, kaj mi devas foriri." Li kuris kaj kuradis la tutan posttagmezon kaj estis tiel kolera kaj hontanta, ke li ne vidis ĉiujn kokinojn, kiuj ridis je li pasanta. Kiam la nokto venis, la eikonio estis ankoraŭ ridanta en sia hejmo.

### QUESTIONS

**Ĉu?** Whether? Yes? or No?

**Kio?** What?

**Kiu?** Who? Which?

**Kiel?** How?

**Kiam?** When?

**Kie?** Where?

**Kial?** Why?

**Kia?** What kind of?

**Kiom da?** How much? How many?

1. Kiun renkontis la vulpo sur la strato?
2. Ĉu la vulpo konis la eikonion?
3. Por kio li invitis ŝin?
4. Ĉu la eikonio akceptis?
5. Kiam ŝi iris al la hejmo de la vulpo?

6. Ĉu la vulpo ricevis ŝin bone?
7. Kion diris la vulpo?
8. Ĉu li havis bonan vespermanĝon?
9. Kion oni alportis?
10. En kio estis la supo?
11. Ĉu la vulpo manĝis la supon?
12. Kiel li manĝis ĝin?
13. Kiu ne manĝis supon?
14. Kial la eikonio ne povis manĝi la supon?
15. Ĉu la eikonio estis kontenta?
16. Ĉu ŝi koleriĝis?
17. Por kiam ŝi invitis la vulpon?
18. Ĉu la vulpo akceptis la inviton?
19. Kion li faris la morgaŭan matenon?
20. Kial li ne laboris por kapti kokidojn?
21. Kiam li alvenis al la domo de la eikonio?
22. Kion pensis la vulpo?
23. Kion li flaris enirante en la domon?
24. Kiel ricevis lin la eikonio?
25. Kie ili ambaŭ sidis?
26. Kio estis alportata?
27. En kio estis la viando?
28. Ĉu la vazo havis larĝan truon?
29. Kiu povis manĝi rapide la viandon?
30. Kiu ne povis manĝi la viandon?
31. Kial la vulpo ne povis kapti la viandon?
32. Ĉu la vulpo havis bekon?
33. Ĉu la vulpo estis malsata?
34. Ĉu li restis ĉe la eikonio?

35. Kien li forkuris?  
 36. Ĉu la eikonio estis malĝoja?  
 37. Ĉu la vulpo estas ruza?  
 38. Kiu estis pli ruza?  
 39. Kiu ridis laste?

## 41. KVARDEK UNUA LECIONO

(See Grammar, § 26 and § 28)

**Kiom da fojoj?** How many times?

**Unu funto da sukero.** One pound of sugar.

**Sufiĉe da teo.** Enough tea.

**Jen glaso da lakto.** Here is a glass of milk.

**Ju pli mi aĉetas, des pli mi elspezas.** The more  
 I buy, the more I spend.

**Po kvin cendoj je funto.** At five cents the pound.

1. Kiom da sukero vi aĉetis? Mi aĉetis tri funtojn da ĝi.
2. Ĉu vi pagis por ĝi? Jes, mi pagis po tri cendoj je funto.
3. Kiom vi elspezis hodiaŭ? Mi elspezis tri dolarojn kaj kvardek cendojn.
4. Ĉu vi aĉetis multajn aferojn? Mi aĉetis multe da teo kaj multe da kukoj.
5. Ĉu vi deziras havi multe da teo hodiaŭ vespere? Ju pli da invititoj venos, des pli da teo ni devos havi.

6. Kiom da fojoj vi jam venis tien ĉi? Sinjoro, ĝi estas la unua fojo; mi neniam antaŭe venis.
7. Kiom da fojoj vi manĝas ĉiutage? Mi manĝas tri aŭ kvarfoje en unu tago.
8. Ĉu vi manĝas multe da legomoj? Jes, sinjoro, mi manĝas pli da legomoj ol da viando.
9. Kiom vi pagis por la lakto, kiun ni trinkis? Mi pagis kvin cendojn por ĉia granda glaso kaj elspezis por ni ĉiuj dudek kvin cendojn.
10. Ĉu vi aĉetis sufiĉe da kukoj por ĉiuj knabetoj? Mi aĉetis ducent kuketojn kaj, se ĝi ne sufiĉas, mi aĉetos pli.
11. Ĉu vi trinkis la tutan lakton? Jes, sinjoro, mi trinkis ĝin tute, ĉar restis da ĝi nur unu glaso kaj duono.

#### 42. KVARDEK DUA LECIONO

**Li ĵus alvenis.** He has just arrived.

**Mi foriros tuj.** I will go away at once.

**De kiam vi vojaĝas?** Since when are you travelling?

**Antaŭ tri jaroj.** Three years ago.

**Post du tagoj.** After two days.

**Kiam vi estas hejme?** When are you at home?

**Helpi, to help.**

**For, away.**

1. Ĉu vi ricevis leteron de via patrino? Mi ne jam vidis la leterojn, ĉar la poŝtisto ĵus alvenis.
2. Kion vi faros posttagmeze? Ni foriros tuj post la tagmanĝo por viziti nian onklon.
3. De kiam vi ne vidis vian onklon? De tri monatoj ni lin ne vidis, ĉar la lastan fojon kiam li venis, antaŭ dek tagoj, ni forestis.
4. Ĉu via patro estas hejme? Ne, sinjoro, li forestas de du semajnoj, ĉar li vojaĝas tra Eŭropo.
5. Kiam via patro revenos? Li revenos post kvin semajnoj, se nenio malhelpas lin.
6. Ĉu vi povas helpi min? Jes, sinjorino, mi tuj venos al vi.
7. Kiel vi sanas, fraŭlino? Mi dankas vin, sinjoro, mi ĵus revenis de la kamparo kaj sanas tre bone.
8. Ĉu via patrino ankaŭ sanas tute bone? Ne tute, sinjoro, ŝi estis malsana dum la tuta vintro kaj ŝi ankoraŭ ne tute resaniĝis.
9. Antaŭ kiom da jaroj vi vizitis Eŭropon? Mi ĝin travojaĝis dufoje, unuan fojon antaŭ dudek jaroj kaj duan fojon antaŭ tri jaroj.
10. Ĉu vi baldaŭ reiros hejmen? Ne, sinjoro, mi ne reiros hejmen antaŭ la fino de la vintro.

43. KVARDEK TRIA LECIONO

(See Grammar, § 25 and § 28, suffix -AD)

**Li venis por studi.** He came (in order) to study.

**Mi ŝatas remi.** I like to row.

**Mi volas preni ĝin.** I want to take it.

**Li intencas ĉeesti.** He intends to be present.

**Li devas foriri.** He has to (he must) go away.

1. Kiu intencas veni kun mi morgaŭ por remi?  
Mi opinias, ke multaj volos veni kun vi, sed mi ne povos, ĉar mi devas labori hejme.
2. Ĉu vi ŝatas studadi la tutan tagon? Ne, sinjoro, mi ne ŝatas ĝin tre multe, sed mi devas ĝin fari.
3. Kial tiu ĉi knabo ne ĉeestis hieraŭ la lecionon?  
Li ne povis ĉeesti ĝin, ĉar li devis helpi sian patron hejme.
4. Kion vi volas forpreni de tiu ĉi ĉambro? Mi intencas forpreni tiun tablon, kiu estas multe tro granda por via ĉambreto.
5. Ĉu vi ŝatas restadi hejme, sinjoro? Ne, sinjorino, mi multe pli ŝatas promenadi tra la kamparo, sed estas mia devo fini mian grandan laboron.
6. Kiu venis tien ĉi hieraŭ vespere? Via nevo, sinjoro, venis tien ĉi por vidi vin, sed vi forestis.

7. Ĉu via patro devos ankoraŭ vojaĝadi tiun ĉi vintron? Ne, sinjoro, mi opinias, ke li de nun tute ne plu vojaĝos.
8. Kial via frato ne venis hieraŭ vespere por remi kun ni? Mi ne scias kial li ne venis, ĉar antaŭ la vespermanĝo li diris al mi, ke li intencas iri kun vi.
9. Kiu devas resti tie ĉi? Mi devas resti, sinjoro, ĉar mi ne tute finis mian laboron.
10. Kiel vi alvenis tien ĉi tiel rapide? Sinjoro, mi kuradis la tutan tempon, ĉar mi ne volis alveni malfrue.

#### 44. KVARDEK KVARA LECIONO

**Kiu timas vin?** Who fears you? Who is afraid of you?

**Tiu dubas pri via forteco.** That one has doubts about your strength.

**Ĉiu esperas tion.** Every one hopes that.

**Neniu mirus pri ĝi.** Nobody would wonder about it.

**Iu rakontis al mi.** Some one told me.

1. Ĉu vi timas, ke via patro ne povos veni? Jes, mi tre timas tion, ĉar li estas tre okupata kun iu, kiu venis hieraŭ de la urbo.



2. Kiujn domojn vi vizitis en tiu ĉi vilaĝo? Mi vizitis nur la du dometojn, kiuj apartenas al mia onklo.
3. Kial vi dubas, ĉu li venos? Mi tre dubas pri tio, ĉar mi nescias, kiu lin sciigis pri nia invito.
4. Kion vi esperas ricevi de via frato? Mi nur esperas, ke mi ricevos baldaŭ leteron de li, ĉar mi nescias ĉe en kiu lando li estas.
5. Kiu rakontis al vi pri la foriro de mia frato? Via filo, sinjoro, diris al mi, ke li intencis forvojaĝi; kaj ĥieraŭ mi parolis kun kelkaj personoj kiuj vidis lin, ĉe la stacio.
6. Kiu intencas ĉeesti morgaŭ la vespermanĝon en mia ĝardeno? Mi opinias, ke ni ĉiuj venos.
7. Ĉu iu venis en mian ĉambron, dum mi forestis? Ne, sinjoro, mi vidis nenium.
8. Ĉu tiu knabo estas sufiĉe forta por remi la tutan vesperon? Ho, jes, sinjoro, ne dubu pri lia forteco; mi ĉiam miris pri ĝi.
9. Ĉu vi povas remi sufiĉe rapide, por ke ni alvenu hejmen post dek minutoj? Jes, sinjoro, ĝi ne estas tre malproksima.
10. Kiu forprenis ĉiujn seĝojn de tiu ĉi ĉambro? Mi opinias, ke tiuj, kiuj faris tion, estas la knaboj, kiuj devis resti hejme.

## 45. KVARDEK KVINA LECIONO

<b>Avo</b> , grandfather.	<b>Pipo</b> , pipe.
<b>Ŝati</b> , to like.	<b>Korto</b> , yard.
<b>Preferi</b> , to prefer.	<b>Trans</b> , across.
<b>Trankvila</b> , quiet.	<b>Ĉevalo</b> , horse.
<b>-ec</b> , quality (see § 38).	<b>Bovo</b> , ox.
<b>Trankvileco</b> , quietness.	<b>Bovino</b> , cow.
<b>Kampo</b> , field.	<b>Virbovo</b> , bull.
<b>-ar</b> , collection (see § 38).	<b>Koko</b> , rooster.
<b>Kamparo</b> , country.	<b>Anaso</b> , duck.
<b>Arbo</b> , tree.	<b>Ansero</b> , goose.
<b>Arbaro</b> , forest.	<b>Terpomo</b> , potato.
<b>Farmo</b> , farm.	<b>Tritiko</b> , wheat.
<b>Apud</b> , near.	<b>Spaco</b> , space.
<b>Vasta</b> , wide, vast.	<b>Nur</b> , only.
<b>Salono</b> , parlour.	<b>Herbo</b> , grass.
<b>Tero</b> , earth, ground.	<b>Paŝti</b> , to pasture.
<b>Etaĝo</b> , floor.	<b>Fojno</b> , hay.
<b>Ligno</b> , wood.	<b>Plugi</b> , to plow.
<b>Ŝtupo</b> , stairstep.	<b>-il</b> , instrument (§ 38).
<b>Inter</b> , between.	<b>Veturi</b> , to ride.
<b>Kameno</b> , chimney.	<b>Veturilo</b> , carriage.
<b>Brako</b> , arm.	<b>Falĉi</b> , to mow.
<b>Seĝo</b> , chair.	<b>Levi</b> , to rise.
<b>-eg</b> , augmentative (§ 38).	<b>Leviĝi</b> , to get up.
<b>Fumi</b> , to smoke.	<b>Benko</b> , bench.
	<b>Kiel</b> , as.
	<b>Vivi</b> , to live.

<b>Sana</b> , healthy.	<b>Senti</b> , to feel.
<b>Pasi</b> , to pass.	<b>Bedaŭri</b> , to regret.
<b>Boato</b> , boat.	<b>Ĉiam</b> , always.
<b>Lago</b> , lake.	<b>Io</b> , something.
<b>Lageto</b> , pond.	<b>Kio</b> , what.
<b>Rampi</b> , to climb.	<b>Tio</b> , that.
<b>Libera</b> , free.	<b>Nenio</b> , nothing.
<b>Freŝa</b> , fresh.	<b>Ĉio</b> , everything.

### SUR LA KAMPARO

Mia avo ne ŝatas la urbojn, li preferas la trankvilecon de la kamparo. Li havas beletan farmon apud la rivero.

En lia domo, la ĉambroj estas tre altaj kaj vastaj. Estas neniu salono aŭ skriboĉambro; estas nur sur la teretaĝo la kuirejo kaj grandega manĝoĉambro. Al la dua etaĝo oni alvenas per ligna ŝtuparo, kaj oni trovas tie nur dormoĉambrojn.

Malsupre en la manĝoĉambro estas granda tablo kun multaj seĝoj, kaj inter du fenestroj estas la kameno. Mia avo ŝatas sidadi ĉe l'kameno en sia granda brakseĝego fumante sian pipon. Antaŭ la domo estas granda korto, trans kiu loĝas la ĉevaloj en la ĉevalejo kaj la bovinoj en la bovinejo. Pli malproksima estas loko por la kokinoj, anasoj kaj anseroj.

Ĉirkaŭ la farmo estas la grandaj kampoj de mia avo. Estas kampoj kun terpomoj kaj aliaj kun

tritiko. Estas ankaŭ granda spaco nur kun herbo; tio estas la paŝtejo de la bovinoj.

En la farmokorto sub la fojnejo, mia avo havas unu plugilon kaj kelkajn veturilojn. Oni lasas tie ankaŭ la falĉilojn. Mia avo loĝas kun du nevoj kaj iliaj familioj. Ĉiumatene ili leviĝas tre frue por eklabori sur la kampoj. Trifoje en la tago ili manĝas, sed tre simple. Vespere, post la lasta manĝo, ili restas kune por interparoli aŭ kanti. Somere ili sidas sur la benkoj en la korto, kaj vintre ili sidas en la ĉambrego ĉe la kameno.

Mia avo, kiel ĉiuj, kiuj vivas tie kun li, estas tre sana kaj forta. Mi tre ŝatas iri al la farmo de mia avo kaj pasigi tie kelkajn tagojn. Mi helpas miajn kuzojn en ilia laboro aŭ mi kuras tra la kampoj kun la plej junaj. Mi remas kun ili en ilia boato sur la lageto apud la arbareto. Ni rampas kune sur la arboj; ni estas ĝojaj kaj liberaj la tutan tagon. Se ni estas lacaj, ni iras al la bovinejo por trinki tute freŝan lakton. Kiam mi revenas al la urbo post kelkaj tagoj pasigitaj ĉe la farmo de mia onklo, mi sentas min pli forta kaj pli sana. Mi nur bedaŭras, ke mi ne povas resti ĉiam sur la kamparo.

### QUESTIONS

Ĉu? Whether? Yes? or No?

Kio? What?

**Kiu?** Who? Which?

**Kiam?** When?

**Kie?** Where?

**Kiel?** How?

**Kial?** Why?

**Kiom da?** How much? How many?

1. Kie loĝas via avo?
2. Kial li ne loĝas en urbo?
3. Kie estas lia farmo?
4. Kiel estas la ĉambroj en lia domo?
5. Ĉu estas salono ĉe li?
6. Kiuj ĉambroj estas sur la teretaĝo?
7. Kiel oni alvenas al la dua etaĝo?
8. Kio estas sur la dua etaĝo?
9. Kio estas en la manĝoĉambro?
10. Kie sidas ofte via avo?
11. Kio estas trans la farmokorto?
12. Ĉu mia avo havas multajn kampojn?
13. Kie estas la fojnejo?
14. Kio estas sub la fojnejo?
15. Per kio oni plugas la kampojn?
16. Kiel oni falĉas la herbon?
17. Kiu loĝas kun via avo?
18. Kiam ili leviĝas ĉe via avo?
19. Ĉu ili havas grandajn kaj longajn manĝojn?
20. Kion ili faras vespere?
21. Kiel sanas via avo?
22. Ĉu li estas tre maljuna?

23. Ĉu vi ŝatas viziti lin?  
 24. Kial vi ŝatas la kamparon?  
 25. Kion vi faras ĉe la farmo de via avo?  
 26. Ĉu via avo havas boaton?  
 27. Kie estas tiu boato?  
 28. Ĉu vi ŝatas lakton?  
 29. Kial vi sanas pli bone sur la kamparo ol en la urbo?  
 30. Kial la homoj ne vivas ĉiuj sur la kamparo?

## 46. KVARDEK SESA LECIONO

**De kie vi saltis?** From where did you jump?

**De kiam ŝi dormas?** Since when does she sleep?

**De tie,** from there.

**De tiam,** since then.

**La libro de Karlo.** Charles's book.

**Ĉie kaj ĉiam li suferas de kapdoloro.** Everywhere and always he suffers of headache.

**De kiu vi estas vidita?** By whom have you been seen?

**Iam,** some day, once.

**Ie,** somewhere.

**Neniam,** never.

**Nenie,** nowhere.

1. **De kie venas tiu ĉi knabo?** Li venas de malproksima lando.

2. De kiam vi lin konas? Mi lin konas nur de kelkaj tagoj.
3. Kie li loĝadis de kiam vi lin konis? De tiam li loĝadis kun mi.
4. Ĉu li iam estis malsana en via domo? Ne, sinjoro, li nur suferis iam de kapdoloro.
5. Ĉu li iam ricevis leteron de iu? Ne, sinjoro, li neniam ricevis ion de iu ajn, ĉar neniu sciis, kie li estas.
6. Ĉu vi scias ion pri lia familio? Ne, sinjoro, mi scias nenion pri ĝi; li nur diris al mi, ke lia familio vivas ie en lia lando.
7. Kion la knabo faris kun vi la tutan tempon? Li legis librojn miajn, kaj li lernis kion mi instruis al li.
8. Ĉu li iam estis sola en via domo? Ne, sinjoro, li estis ĉiam kun mi ĉie, kien mi iris.
9. De kiom da tagoj li estas kun vi ĝis hodiaŭ? De ses tagoj li estas kun mi.
10. Ĉu la domo, kie vi loĝas, estas via domo? Ne, sinjoro, ĝi estas domo de mia onklo.
11. Kiam vi vidis la knabon la unuan fojon? Antaŭ unu semajno mi vidis lin kaj tiam tuj prenis lin hejmen.

## 47. KVARDEK SEPA LECIONO

**La viro kies ĉevalo falis.** The man whose horse fell.

**Kies plumon vi uzas?** Whose pen are you using?  
**Malgraŭ la pluvo li eliris.** In spite of the rain he went out.

**Kvankam li rifuzis.** Although he refused.  
**Tamen mi provos.** However, I will try.

1. Ĉu vi eliris malgraŭ la pluvo? Jes, sinjoro, mi tute ne timas la pluvon.
2. Ĉu via fratino estis kontenta pri tio? Ne, ŝi estis tre malkontenta, sed mi tamen devis eliri por renkonti mian amikon.
3. Kial vi devis? Mi devis, ĉar hieraŭ mi diris al li, ke mi venos.
4. Ĉu li opiniis, ke vi venos malgraŭ tiu ĉi pluvego? Jes, sinjoro, kvankam la pluvo estas tre forta, li sciis, ke mi ne timus ĝin.
5. Ĉu via amiko konas viajn gepatrojn? Jes, sinjoro, li konas ilin tre bone, kvankam li ne venis tre ofte tien ĉi.
6. Kies ĉapelo estas tie sur la tablo? Mi opinias, ke tio estas la ĉapelo de mia amiko; tamen mi ne estas tute certa pri ĝi.
7. Ĉu vi ne povus certigi kies ĉapelo ĝi estas? Ne, sinjoro, mi ne povus certigi ion, pri kio mi ne scias tute bone.



8. Ĉu vi ne invitis vian kuzon veni ankaŭ hodiaŭ posttagmeze? Jes, mi lin invitis, sed li rifuzis.
9. Kial li rifuzis? Pri tio mi ankaŭ ne scias bone; tamen mi opinias, ke li preferas resti hejme, ĉar li tute ne ŝatas kuri tra la kamparo.
10. Ĉu vi diris al li, ke vi intencas kuradi? Ne, mi diris nenion pri tio, kion ni farus; sed li tre bone scias, ke ni ne ŝatas sidadi la tutan tempon.

#### 48. KVARDEK OKA LECIONO

**Estas necese pentri la muron.** It is necessary to paint the wall.

<b>Koloro</b> , colour.	<b>Verda</b> , green.	<b>Bruna</b> , brown.
<b>Blanka</b> , white.	<b>Aŭ</b> , or.	<b>Griza</b> , grey.
<b>Nigra</b> , black.	<b>Hela</b> , bright.	<b>Rozkolora</b> , pink.
<b>Viola</b> , violet.	<b>Flava</b> , yellow.	<b>Muro</b> , wall.
<b>Blua</b> , blue.	<b>Ruĝa</b> , red.	<b>Eĉ</b> , even.

1. Kiun koloron vi preferas por la muroj tiu ĉi ĉambro? Mi dezirus vidi tie ĉi helan koloron, blankon aŭ helbluon.
2. Kiu estas la koloro de la arbfolioj? Ilia koloro estas verda.

3. Ĉu la folioj estas ĉiam verdaj? Ne, en aŭtuno, kiam ili falas sur la teron, ili estas brunaj, flavaj aŭ eĉ ruĝaj.
4. Kiun koloron havas la papero de tiu ĉi libro? Ĝia papero estas blanka.
5. Ĉu vi opinias, ke estus bone blankigi la murojn de via domo? Jes, mi opinias, ke estas tute necese reblankigi ilin, ĉar ili estas tre malpuraj nun.
6. Ĉu la rozoj havas ĉiuj la saman koloron? Ne, sinjoro, estas ankaŭ blankaj kaj ruĝaj rozoj.
7. Ĉu estas blua la lageto apud la farmo de via avo? Ne, ĝi estas verda, ĉar ĝia akvo estas malfreŝa.
8. Kiel vi ŝatas nian novan dometon? Mi ĝin tre ŝatas; sed tamen mi opinias, ke estus pli bone pentri viajn murojn verde aŭ grize ol lasi ilin tiel sen certa koloro.
9. Ĉu vi jam vizitis la farmon de mia onklo? Ne, mi neniam iris tien.
10. Kiel estas la muroj de lia domo tie? La muroj estas grizaj; mi preferus vidi ilin blankaj.
11. Ĉu via avo volus havi blankajn murojn ĉe sia domo? Ne, li ne volus, ĉar li timus, ke ili tra rapide malpuriĝos.

49. KVARDEK NAŬA LECIONO

(See Grammar, § 13 and § 38, suffixes -EM, -UL)

<b>Mi vidis lin kuranta.</b>	I saw him running.
<b>Nek nova, nek bona.</b>	Neither new nor good.
<b>Parolema, talkative.</b>	<b>Moki, to mock.</b>
<b>Manĝema, gluttonous.</b>	<b>Mokemulo, a mocker.</b>
<b>Bonulo, a good man.</b>	<b>Kia? what kind of?</b>
<b>Riĉulo, a rich man.</b>	<b>Tia, such.</b>

1. Kial vi estas tiel dormema hodiaŭ? Ĉar mi tute ne dormis lastan nokton kaj mi estas tre laca.
2. Ĉu vi konas mian kuzon Paŭlon? Ne, sed mi scias, ke li estas grandegulo, ĉar iu rakontis al mi, ke li ne povas eniri vian pardon kun sia ĉapelo sur la kapo.
3. Ĉu estas multaj malriĉuloj en via urbo? Jes, estas multaj malriĉuloj kaj malfeliĉuloj.
4. Kial vi ne finis vian laboron, Paŭlo? Mi ne estis trankvila tie ĉi, ĉar ŝercemuloj min malhelpis la tutan matenon.
5. Kiu estas ŝercemulo? Ŝercemulo estas iu homo, kiu ŝatas ŝerci.
6. Kiaj homoj vivas en via vilaĝo? Simplaj kaj laboremaj homoj, kiuj ŝatas vivadi trankvile kaj silente.

7. Ĉu vi ŝatas tian vivadon? Jes, sinjoro, mi ŝatas vivadon tian, kian ili ĝin havas.
8. En kiu domo vi loĝas? Mi loĝas en la tria domo sur la placo.
9. Kia domo ĝi estas? Ĝi estas dometo kun muroj verde pentritaj.
10. Ĉu viaj gepatroj loĝas kun vi? Ne, sinjoro, nek mia patro, nek mia patrino loĝas tie.
11. Ĉu vi neniam loĝis en urbo? Ne, sinjoro, mi nek povis, nek deziris iam loĝi tie.
12. Kia familio loĝas en la dua domo? Familio da riĉuloj; ili vivas sufiĉe simple kaj la mokemuloj multe ŝercas pri tio.

## 50. KVINDEKA LECIONO

<b>Kristnasko</b> , Christmas.	<b>Ĝojo</b> , joy.
<b>Kristo</b> , Christ.	<b>Paki</b> , to pack.
<b>Nasko</b> , birth.	<b>Pakaĵo</b> , package.
<b>Festo</b> , feast.	<b>Montri</b> , to show.
<b>Meti</b> , to put.	<b>Reciproke</b> , reciprocally.
<b>Ŝuo</b> , shoe.	
<b>Laŭ</b> , according to.	<b>Donaco</b> , present, gift.
<b>Kutimo</b> , costume.	<b>Bombono</b> , candy.
<b>Nacio</b> , nation.	<b>Pupo</b> , doll.
<b>Lito</b> , bed.	<b>Ŝipo</b> , ship, boat.
<b>Pensi</b> , to think.	<b>Oranĝo</b> , orange.
<b>Veki</b> , to awake.	<b>Sufiĉe</b> , enough.

<b>Kune</b> , together.	<b>Krono</b> , crown.
<b>Per</b> , with, by means of.	<b>Lumo</b> , light.
<b>Baldaŭ</b> , soon.	<b>Elektro</b> , electricity.
<b>Pacienco</b> , patience.	<b>Kuŝi</b> , to lie down.
<b>Pordo</b> , door.	<b>Tranĉi</b> , to cut.
<b>Ŝlosi</b> , to close, to lock.	<b>Tranĉilo</b> , knife.
<b>Mistero</b> , mystery.	<b>Segi</b> , to saw.
<b>Kapo</b> , head.	<b>Korbo</b> , basket.
<b>Kontraŭ</b> , against, opposite.	<b>Kudri</b> , to sew.
<b>Aŭskulti</b> , to listen.	<b>Kudrilo</b> , needle.
<b>Ĉarmi</b> , to charm.	<b>Pinglo</b> , pin.
<b>Stari</b> , to stand.	<b>Tondi</b> , to cut with scissors.
<b>Abio</b> , Christmas tree.	<b>Tondilo</b> , scissors.
<b>Ŝargi</b> , to load.	<b>Fadeno</b> , thread.
<b>Oro</b> , gold.	<b>Kotono</b> , cotton.
<b>Nukso</b> , nut.	<b>Silko</b> , silk.
<b>Pomo</b> , apple.	<b>Memori</b> , to remember.

## KRISTNASKO

La familio de mia onklo havis belegan kristnaskan feston tiun ĉi jaron. La vesperon antaŭ la kristnaska tago, la infanoj metis siajn ŝuojn en la kamenon de l'salono, laŭ la malnova kutimo de kelkaj nacioj. Dum longa tempo ili ne povis dormi en siaj litetoj, pensante pri tio, kion ili eble ricevos.

La kristnaskan matenon, tre frue, ili vekiĝis kaj leviĝis por iri en la salonon kaj vidi, ĉu iliaj ŝuoj estas jam plenaj. Tiel ili estis, kaj ĝoje revenis la infanoj al siaj litoj por malfermi ĉiujn pakajetojn, kiujn ili trovis. Ĉiu havis diversajn aferojn, kaj ili montris al si reciproke la diversajn donacetojn, bombonojn, pupetojn, oranĝojn, kaj tiel plu.

Dum la tuta mateno ili estis sufiĉe okupataj ludante kune per la ricevitaj ludiloj kaj manĝante siajn bombonojn, sed posttagmeze ili baldaŭ malpacieneciĝis kaj nesciis kion fari. En la salonon ili ne povis eniri, ĉar ĝiaj du pordoj estis ŝlositaj. Misteraj bruoj aŭdiĝis, kaj la infanoj venadis meti sian kapon kontraŭ la pordo por aŭskulti ilin.

Je la kvina horo la salonaj pordoj malfermiĝis kaj, antaŭ la enirantoj ĉarmataj, staris belega abio ŝarĝita je multegaj ornamaĵoj, oritaj nuksoj, pomoj, bombonaj kronetoj, k.t.p. La arbo estis lumigata per multego da elektraj lampetoj ruĝaj, verdaj kaj bluaj. Sub la abio kuŝis ankoraŭ novaj donacoj por la infanoj, pli grandaj kaj pli belaj ol tiuj, kiujn ili ricevis la matenon en siaj ŝuoj. Ne nur por ili, sed ankaŭ por la gepatroj estis kelkaj pakajoj, kaj post kelkaj minutoj, ĉiuj, junaj kaj maljunaj, estis kontentaj, ridentantaj kaj dankantaj unu la alian.

Mia kuzo Paŭlo ricevis de sia patro bonegan

tranĉilon kun malgranda segilo; mia kuzineto Lidio ricevis de mia onklino korbeton kun ĉio necesa por kudri: kudriloj, pingloj, tondilo kaj tondileto, fadeno, kotono kaj silko diverskoloraj.

Mi ne memoras kion ricevis la aliaj, sed mi nur scias ke ĉiuj estis tre feliĉaj kaj tiun vesperon iris tre malfrue al la lito.

### QUESTIONS

**Ĉu?** Whether? Yes? or No?

**Kio?** What?

**Kiu?** Which? Who?

**Kia?** What kind of?

**Kies?** Whose?

**Kiel?** How?

**Kial?** Why?

**Kiam?** When?

**Kie?** Where?

**Kiom da?** How much? How many?

1. Kiun feston oni havas la dudek kvinan de Decembro?
2. Ĉu viaj kuzoj havis belan Kristnaskon?
3. Kion faris viaj kuzoj la antaŭvesperon de Kristnasko?
4. Kial ili metis siajn ŝuojn en la kamenton?
5. Ĉu ili facile ekdormis tiun nokton?

6. Kiam ili vekigis?
7. Kien ili tuj iris?
8. Ĉu estis io en la ŝuoj?
9. Kion ili trovis en siaj ŝuoj?
10. Kien revenis la infanoj por malfermi la pakajojn?
11. Kio estis en la pakajoj?
12. Kion ili faris la tutan matenon de Kristnasko?
13. Kial ili ne povis eniri la salonon post la tagmanĝo?
14. Je kioma horo malfermiĝis la salonpordoj?
15. Kio staris en la salono?
16. Kio estis sur la abio?
17. Kiel estis lumigita la abio?
18. Ĉu la infanoj estis kontentaj?
19. Kion ili trovis sub la arbo?
20. Ĉu estis donacoj nur por la infanoj?
21. Kion ricevis Paŭlo?
22. Kion oni faras per tranĉilo?
23. Kion ricevis Lidio?
24. Ĉu vi memoras kion ricevis la aliaj?
25. Ĉu ĉiuj infanoj havas tiel belan kristnaskan feston?
26. Kial multaj infanoj tute ne havas feston?
27. Ĉu la feliĉaj infanoj scias pri la malfeliĉaj?



## GRAMMAR

There are no exceptions to any rule.

§ 1. ARTICLE.—There is no indefinite article in Esperanto. **Glaso** means *a glass*.

There is only one definite article, invariable: **la**, used as the English *the* for singular and plural.

After a preposition ending with a vowel the article may be elided, **tra l'** for **tra la**; **de l'** for **de la**.

§ 2. SUBSTANTIVES always end in *o*: **tablo**, a table; **la bono**, the good.

§ 3. ADJECTIVES always end in *a*: **bona**, good; **bela**, beautiful. **La granda kato**, the great cat.

DERIVED ADVERBS are formed with the ending *e*: **bone**, well; **bele**, beautifully.

§ 4. The PLURAL is formed for adjectives and substantives by the adding of a *j* (pronounced as the English *y*): **La belaj katoj**, the beautiful cats. The adjective always agrees with its noun: **La tabloj estas bonaj**, the tables are good.

§ 5. VERBS in the *infinitive* end in *i*: **paroli**, to speak; **trinki**, to drink; **moki**, to mock.

The *Present tense* ends in *as*: **mi parolas**, I speak.

The *Past tense* ends in *is*: **vi mokis**, you mocked, you have mocked.

The *Future tense* ends in *os*: **li parolos**, he will (or shall) speak.

The *Conditional* ends in *us*: **ni mokus**, we would (or should) mock.

The *Purpose mood* ends in *u*: **parolu!** speak! **ni moku**, let us mock; **mi deziras ke li parolu**, I wish that he may speak; **ke li ne vundu**, that he may not wound.

#### § 6. ACTIVE PARTICIPLES end:

*Present* in *anta*: **parolanta**, speaking.

*Past* in *inta*: **parolinta**, having spoken.

*Future* in *onta*: **parolonta**, about to speak.

#### § 7. PASSIVE PARTICIPLES end:

*Present* in *ata*: **mokata**, being mocked.

*Past* in *ita*: **mokita**, having been mocked.

*Future* in *ota*: **mokota**, about to be mocked.

They are also changed into substantives, adjectives, or adverbs: **la mokanto**, the mocker; **la parolanto**, the speaker; **trinkante**, by drinking; **vundito**, a wounded man.

§ 8. COMPOUND TENSES may be formed by the help of the only auxiliary in Esperanto: **esti**, to be, but must be avoided as much as possible.

**Mi estas parolanta**, I am speaking (seldom used).

**Vi estis mokinta**, you had mocked (= you have been having mocked).

**Ni estos vundataj**, we will be wounded.

**Li ne estu vundita**, let him not be wounded.

§ 9. The PRONOUNS are:

<b>mi</b> , I.	<b>ĝi</b> , it.
<b>vi</b> , you.	<b>ni</b> , we.
<b>li</b> , he.	<b>vi</b> , you.
<b>ŝi</b> , she.	<b>ili</b> , they.

**Ci**, seldom used, means *thou*; **oni** means *one*.

**Si** is the reflexive pronoun for the third person, and means *himself, herself, itself, themselves*.

**Li parolas al si**, he speaks to himself. **Ili estis vunditaj de si**, they were wounded by themselves.

§ 10. *Possessive adjectives* are formed by adding the ending *a* to the pronouns: **mia**, my; **via**, your; **lia**, his; **ŝia**, her; **ĝia**, its; **nia**, our; **via**, your; **ilia**, their. **Sia**, his own, her own, its own, their own, is used before a complement belonging to the subject of the sentence. **Mia patro promenas kun sia amiko kaj lia filo**, my father walks with his own friend and his (the friend's) son.

§ 11. DIRECT OBJECTS and adjectives qualifying them take the final *n* in order to permit a free and variable construction of the sentence.

**Mi trinkas bonan kafon**, I drink good coffee; **Bonan kafon mi trinkas**; **Kafon mi trinkas bonan**, are all correct ways to build the same sentence. **Ni vidis la larĝajn tablojn**, we saw the wide tables. **Li mokas min**, he mocks me.

§ 12. This ending *n* is used instead of a preposition where the meaning is sufficiently clear, especially when there is the idea of direction or time. Instead of saying **Mi iras al Parizo**, I go to Paris, we say **Mi iras ParizoN**. Instead of **Mi iras AL en la ĉambro**, I go into the chamber, we say **Mi iras en la ĉambroN**. Instead of **Iru AL sub la tablo!** go under the table, one says **Iru sub la tabloN!** Instead of **AL kie vi iras?** where do you go? one says **KiEN vi iras?** Instead of **Restu DUM tri tagoj**, stay during three days, we say **Restu tri tagojN**, etc.

In these examples the final *n* was used instead of **al**, **to**; **dum**, **during**, etc.

§ 13. PREDICATE ADJECTIVES never take the final *n*, because they are simply words used as qualitatives after verbs, as: To be, to seem, to appear, to become, etc. **La patroj estas bonaj**, the fathers are good. **Ili estas grandaj viroj**, they are great men. **Mi trovis vin leganta**, I found you (to be) reading. **Mi kredas tion vera**, I believe that (to be) true.

§ 14. The COMPARATIVE DEGREE is formed by *pli. .ol*, more. .than.

*Pli bona ol mi*, better than I.

*Pli rapide ol kato*, faster than a cat.

*Malpli granda ol ĝi*, less big than it.

§ 15. The SUPERLATIVE DEGREE is formed by *plej. .el*, most. .of.

*La plej bona el ni*, the best of us.

*La plej larĝa tablo*, the widest table.

*La malplej larĝa*, the least wide.

§ 16. EQUALITY is expressed by *tiel. .kiel*, as. .as. *Tiel bona kiel li*, as good as he.

§ 17. CARDINAL NUMBERS are invariable:

1, <i>unu.</i>	5, <i>kvin.</i>	9, <i>naŭ.</i>
2, <i>du.</i>	6, <i>ses.</i>	10, <i>dek.</i>
3, <i>tri.</i>	7, <i>sep.</i>	100, <i>cent.</i>
4, <i>kvar.</i>	8, <i>ok.</i>	1000, <i>mil.</i>

Million is *milion*. The tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals: 20, *dudek*; 30, *tridek*; 40, *kvardek*; 90, *naŭdek*; 500, *kvincent*; 11, *dek-unu*; 12, *dek-du*; 17, *dek-sep*; 64, *sesdek-kvar*; 78, *sepdek-ok*; 452, *kvarcent kvindek-du*; 4927, *kvarmil naŭcent dudek-sep*.

§ 18. ORDINALS are formed by adding *a* to the cardinals; 3d, *tria*; 56th, *kvindek-sesa*; 21st, *dudek-unua*.

§ 19. FRACTIONS are formed by adding **ono**: a half, **duono**; a quarter, **kvarono**; nine-tenths, **naŭdekonoj**; **duona pomo**, half an apple.

§ 20. MULTIPLES are formed by adding **obla**: double, **duobla**; decuple, **dekobla**.

§ 21. DISTRIBUTIVES are formed by adding **ope**: **deko**pe, by tens; **cento**pe, by hundreds.

Nouns, adjectives, and adverbs may be formed from all these, as, for instance: **dekduo**, dozen; **unue**, firstly; **due**, secondly; **duone**, by halves, etc.

§ 22. PREPOSITIONS have in Esperanto precise values, and one must be careful to translate an English preposition by its *logical* rather than by its *apparent* equivalent in Esperanto.

He lives *with* us, **li loĝas ĈE ni**.

He walks *with* me, **li promenas KUN mi**.

He beat me *with* a stick, **li batis min PER bastono**.

Here are three prepositions to translate the three ideas, logically different, contained in the English preposition *with*.

§ 23. When one has doubts as to which preposition to use for indefinite ideas; as in: *at* what time? *at* 3.20 a. m.; *on* Monday next, etc., one may use the indefinite preposition **je** or the final **n** without

preposition: je kioma horo? je 3.20 matene; lundon proksiman.

#### § 24. LIST OF THE PRINCIPAL PREPOSITIONS

Al,	to, towards.	Laŭ,	according to,
Antaŭ,	before.	Malgraŭ,	in spite of.
Apud,	near.	Per,	by, by means of.
Ĉe,	at, with.	Por,	in order to, for.
Ĉirkaŭ,	around, about.	Post,	after, behind.
De,	of, from, by.	Preter,	beyond, by.
Dum,	during.	Pri,	concerning.
Ekster,	outside.	Pro,	because of.
El,	out of.	Sub,	under.
En,	in, into.	Super,	over, above.
Ĝis,	till, until.	Sur,	on, upon.
Inter,	between, among.	Tra,	through.
Kun,	with.	Trans,	across.
Krom,	except, besides, in addition to.		

§ 25. **Anstataŭ**, instead, **antaŭ ol**, before, and **por**, for, are the only prepositions which may be used before verbs. **Anstataŭ diri**, instead of telling; **antaŭ ol fari**, before doing; **por doni**, in order to give. Observe that in Esperanto the *infinitive* is used in such cases, and not the participle.

The expressions *without doing*, *without telling*, must be translated by *in not doing*, *in not telling*: **ne farante**, **ne dirante**.

§ 26. The preposition **DA** is used for *of* after a word of measure: **multe da**, much of.

## § 27. PRINCIPAL NON-DERIVED ADVERBS

<b>Adiaŭ,</b>	good-bye.	<b>Jam,</b>	already.
<b>Almenaŭ,</b>	at least.	<b>Ĵus,</b>	just, just now.
<b>Ankoraŭ,</b>	again, yet.	<b>Jes,</b>	yes.
<b>Ankaŭ,</b>	also.	<b>Ne,</b>	no, not.
<b>Aŭ,</b>	or.	<b>Nun,</b>	now.
<b>Apenaŭ,</b>	scarcely.	<b>Nur,</b>	only.
<b>Baldaŭ,</b>	soon.	<b>Preskaŭ,</b>	almost.
<b>Eĉ,</b>	even.	<b>Tuj,</b>	immediately.
<b>For,</b>	away.	<b>Tute ne,</b>	not at all.

## § 28. ADVERBIAL PHRASES

**Jam . . ne,** no . . more. **Ne . . plu,** no . . longer. **Ŝi jam lin ne aŭdis.** She heard him no more. **Mi ne atendos plu.** I shall wait no longer.

**Jen . . jen,** sometimes . . sometimes. **Jen ŝi ploras, jen ŝi ridas.** Sometimes she weeps, sometimes she laughs.

**Ju pli . . des pli,** the more . . the more. **Ju pli mi vidas lin, des pli mi admiras lin.** The more I see him the more I admire him.

## § 29. LIST OF THE PRINCIPAL CONJUNCTIONS

<b>Alie,</b>	otherwise.	<b>Do,</b>	therefore, then.
<b>Aŭ . . aŭ,</b>	either . . or,	<b>Nek . . nek,</b>	neither . . nor.
<b>Ĉar,</b>	because.	<b>Por ke,</b>	in order that.
<b>Dum,</b>	while.	<b>Se tamen,</b>	if however.
<b>Eĉ se,</b>	even if.	<b>Sekve,</b>	consequently.
<b>Ja,</b>	indeed.	<b>Se nur,</b>	if only.
<b>Kaj,</b>	and.	<b>Tamen,</b>	however.
<b>Kvankam,</b>	although.	<b>Ĉu . . ĉu,</b>	whether . . whether.
<b>Se,</b>	if.	<b>Ĉu . . aŭ,</b>	whether . . or.
<b>Sed,</b>	but.		



§ 30. ABBREVIATIONS.

k.t.p. (*kaj tiel plu*), and so forth.

k.c. (*kaj ceteraj*), et cetera, &c.

t.e. (*tio estas*), that is (to say).

§ 31. INTERROGATION is shown in Esperanto by the little word *ĉu*, which can be translated by *whether*. Putting this word before any positive sentence, without changing anything in its order, makes it a question.

*Li estas bona.* He is good.

*Ĉu li estas bona?* Is he good?

*Ĉu via patro laboras?* Does your father work?

*Ĉu* is used only for simple questions—that is, when there is no word, as *what, when, where*, etc., which already shows the interrogation.

*Kio estas sur la tablo?* What is on the table?

§ 32. The RELATIVE PRONOUN is the word *kiu*, who, which, that. It takes *j* in the plural, as also do *iu, ĉiu, tiu*, etc.

Those men who come, *tiuj homoj kiuj venas*.

The word *kiu* is a pronoun when it is alone, but it corresponds to our adjectives *what* or *which* when it is before a noun. *Kiu parolas?* Who speaks? *Kiuj tabloj estas tie?* Which tables are there?

§ 33. The DEMONSTRATIVE *tiu*, that, is an adjective if before a noun, and a pronoun if alone: *tiu tablo*, that table; *tiu ne venas*, that one

does not come. **Tio** is always a pronoun for things: **mi deziras tion**, I want that. Both may take the little adverb **ĉi** to become more precise: **tiu ĉi**, this one; **tio ĉi**, this thing.

§ 34. Never use **tio**, that (pronoun), instead of **ke**, that (conjunction). **Mi diras, KE ĉiuj kredas TION**, I say *that* all believe *that*.

Use **kiu** for *that*, relative pronoun (= which). **La libro kiun mi vidis**, the book that I saw.

### FORMATION OF WORDS

§ 35. GRAMMATICAL ENDINGS may be used for this purpose: From the root **parol'**: **paroli**, to speak; **parolo**, speech; **parola**, oral; **parole**, orally. From the root **varm'**: **varma**, warm; **varme**, warmly; **la varmo**, the warmth.

§ 36. COMPOUND WORDS may be formed:

**Vaporo**, steam; **ŝipo**, ship; **vaporŝipo**, steamboat.

**Tago**, day; **mezo**, middle; **tagmezo**, noon.

### § 37. PREFIXES

**bo-** denotes *relation by marriage*: **patro**, father; **bopatro**, father-in-law. **frato**, brother; **bofrato**, brother-in-law. **filino**, daughter; **bofilino**, daughter-in-law.

- dis-** denotes *separation*: **semi**, to sow; **dissemi**, to disseminate. **ĵeti**, to throw; **disĵeti**, to throw about. **doni**, to give; **disdoni**, to distribute.
- ek-** denotes *beginning*: **paroli**, to speak; **ekparoli**, to start speaking. **vidi**, to see; **ekvidi**, to perceive. **scii**, to know; **ekscii**, to learn, to hear. **dormi**, to sleep; **ekdormi**, to fall asleep.
- ge-** denotes *both sexes taken together*: **patro**, father; **gepatroj**, parents. **onklo**, uncle; **geonkloj**, uncle and aunt. **edzo**, husband; **geedzoj**, husband and wife. **frato**, brother; **gefratoj**, brother(s) and sister(s).
- mal-** denotes *the opposite idea*: **granda**, large; **malgranda**, small. **longa**, long; **mallonga**, short. **riĉa**, rich; **malriĉa**, poor. **fermi**, to shut; **malfermi**, to open.
- re-** denotes *return and repetition*: **veni**, to come; **reveni**, to come back. **doni**, to give; **redoni**, to give back. **diri**, to say; **rediri**, to reply. **montri**, to show; **remontri**, to show again. **iri**, to go; **reiri**, to return.
- sen-** (*without; -less*): **utila**, useful; **senutila**, useless.

## § 38. SUFFIXES

- ad** denotes *duration and continuation of action*: **rigardi**, to look at; **rigardadi**, to view. **paroli**, to speak; **paroladi**, to lecture. **instrui**, to teach; **instruado**, teaching. **kuri**, to run; **kurado**, race. **skribi**, to write; **skribado**, writing.
- aĵ** denotes *concrete ideas*: **bovo**, ox; **bovaĵo**, beef. **trinki**, to drink; **trinkaĵo**, a drink. **kurioza**, curious; **kuriozaĵo**, a curiosity. **nova**, new; **novaĵo**, a novelty; **bela**, beautiful; **belaĵo**, something beautiful. **pli bona**, better; **plibonaĵo**, advantage.
- an** denotes *a member, inhabitant or partisan*: **Parizo**, Paris; **Parizano**, a Parisian. **Kristo**, Christ; **Kristano**, Christian. **respubliko**, republic; **respublikano**, republican.
- ar** denotes *a collection of things*: **vorto**, word; **vortaro**, vocabulary. **vagono**, car; **vagonaro**, train. **homo**, man; **homaro**, humanity. **plumo**, feather; **plumaro**, plumage. **arbo**, tree; **arbaro**, forest.
- ebl** denotes *possibility*: **vidi**, to see; **videbla**, visible. **kredi**, to believe; **kredebla**, credible. **mangĝi**, to eat; **mangĝebla**, edible. **akcepti**, to accept; **akceptebla**, acceptable.

- ec denotes *quality, abstract ideas*: **bela**, beautiful; **beleco**, beauty. **feliĉa**, happy; **feliĉeco**, happiness. **simpla**, simple; **simpleco**, simplicity. **longa**, long; **longeco**, length. **ebla**, possible; **ebleco**, possibility. **amiko**, friend; **amikeco**, friendship.
- eg denotes *enlargement, intensity of degree*: **bela**, beautiful; **belega**, splendid. **granda**, large; **grandega**, immense. **domo**, house; **domego**, mansion. **bona**, good; **bonega**, excellent. **ridi**, to laugh; **ridegi**, to roar.
- ej denotes *place allotted to*: **lerni**, to learn; **lernejo**, school. **kuri**, to cook; **kuirejo**, kitchen. **dormi**, to sleep; **dormejo**, dormitory. **drogo**, drug; **drogejo**, drug-store. **kombi**, to comb; **kombejo**, barber-shop. **lavi**, to wash; **lavejo**, lavatory.
- em denotes *propensity or disposition*: **babili**, to chatter; **babilema**, loquacious. **paroli**, to talk; **parolema**, talkative. **kredi**, to believe; **kredema**, credulous. **mangĝi**, to eat; **mangĝema**, gluttonous. **labori**, to work; **laborema**, industrious. **mallaborema**, lazy; **malkredema**, incredulous.
- er denotes *one element of a collection*: **mono**, money; **monero**, a coin. **sablo**, sand; **sablero**, grain of sand. **neĝo**, snow; **neĝero**, a flock.

- estr** denotes *a chief or a leader*: **regno**, state; **regnestro**, ruler. **urbo**, city; **urbestro**, mayor. **ŝipo**, ship; **ŝipestro**, captain.
- et** denotes *diminution of degree*: **domo**, house; **dometo**, cottage. **lago**, lake; **lageto**, pond. **bela**, beautiful; **beleta**, pretty. **ridi**, to laugh; **rideti**, to smile. **knabino**, girl; **knabineto**, little girl. **varma**, warm; **varmeta**, lukewarm.
- id** denotes *the young of, the descendant of*: **Izraelo**, Israel; **Izraelido**, Israelite. **reĝo**, king; **reĝido**, prince. **kato**, cat; **katido**, kitten. **hundo**, dog; **hundo**, puppy.
- ig** denotes *causing something to be*: **bela**, beautiful; **beligi**, to beautify. **granda**, large; **grandigi**, to enlarge. **pura**, clean; **purigi**, to clean. **malpurigi**, to soil; **purigo**, cleaning. **morti**, to die; **mortigi**, to kill. **mortiga**, mortal, killing; **mortigo**, murder. **memori**, to remember; **memorigi**, to recall. **veni**, to come; **venigi**, to let, to make come.
- iĝ** denotes *the action of becoming*: **bela**, beautiful; **beliĝi**, to become beautiful. **granda**, large; **grandiĝi**, to grow. **perdi**, to lose; **perdiĝi**, to get lost. **ruĝa**, red; **ruĝiĝi**, to blush. **montri**, to show; **montriĝi**, to appear. **rompi**, to break; **rompiĝi**, to get broken.

- ind denotes *worthiness*: **admiri**, to admire; **admirinda**, worthy. **memori**, to remember; **memorinda**, memorable. **honorĭ**, to honour; **honorinda**, worthy of honour.
  
- il denotes *the instrument*: **tranĉi**, to cut; **tranĉilo**, knife. **balai**, to sweep; **balailo**, broom.
  
- in denotes *the feminine*: **patro**, father; **patrino**, mother. **onklo**, uncle; **onkino**, aunt. **aktoro**, actor; **aktorino**, actress.
  
- ist denotes *profession or occupation*: **lingvo**, language; **lingvisto**, linguist. **kanti**, to sing; **kantisto**, singer. **pano**, bread; **panisto**, baker. **instrui**, to teach; **instruisto**, teacher. **kui**, to cook; **kuiristino**, cook (woman). **Esperanto**; **esperantisto**, Esperantist. **scienco**, science; **sciencisto**, scientist.
  
- ujo denotes *a container*: **inko**, ink; **inkujo**, inkstand. **mono**, money; **monujo**, purse. **sukero**, sugar; **sukerujo**, sugar bowl. **Franco**, French; **Francujo**, France. **pomo**, apple; **pomujo**, apple tree. **Franclando** for *France* and **pomarbo** for *apple tree* may be used also.

- ulo denotes *one remarkable for some quality*: **brava**, brave; **bravulo**, a brave man. **malriĉa**, poor; **malriĉulo**, a poor man. **freneza**, foolish; **frenezulo**, a fool. **ĝibo**, hump; **ĝibulo**, humpback. **bela**, beautiful; **belulino**, a beauty.
- ĉj denotes *the masculine affectionate diminutive*: **patro**, father; **paĉjo**, papa. **Josefo**, Joseph; **Joĉjo**, Joe.
- nj denotes *the feminine affectionate diminutive*: **patrino**, mother; **panjo**, mama. **Florenco**, Florence; **Flonjo**, Flo.
- um *indefinite suffix playing similar role in forming words as je among the prepositions*. **plena**, full; **plenumi**, to fulfil. **vento**, wind; **ventumilo**, fan. **kruco**, cross; **krucumi**, crucify.
- aĉ denotes *inferiority, poor quality*: **domo**, house; **domaĉo**, shanty. **ĉevalo**, horse; **ĉevalaĉo**, nag.

EXAMPLES: **Malgajeco**, sadness. **Mal**, contrary; **gaj**, gay; **eco**, quality. **Malfaciligi**, to make difficult. **Mal**, contrary; **facil**, easy; **igi**, to make, to cause something to be.



## § 39. CAPITALS

Capitals are used only for proper names, names of countries and cities included (**F**rancojuo, **P**arizo). Such words as the names of races and their correlative adjectives and adverbs are written with a small letter (**f**ranco, **f**ranca, **f**rance).

## § 40. PUNCTUATION

Every clause must be separated from the others by a sign of punctuation. (**L**a infano, **k**iun mi vidis, **e**stas malsana.)

## § 41. ORDER OF WORDS

*Be always clear!* is the only rule given by Dr. Zamenhof for the construction of sentences in Esperanto. The greatest liberty is given.

Hieraŭ mian patron li vidis.  
 Li vidis mian patron hieraŭ.  
 Li hieraŭ vidis mian patron.  
 Mian patron hieraŭ li vidis.  
 Mian patron li vidis hieraŭ.

Etc., etc.

Those are all correct ways of saying in Esperanto: *He saw my father yesterday.* If you want to insist upon a certain word, put it in the beginning of the sentence.

## FORTY-FIVE ADVERBS, RELATIVE PRONOUNS, ETC.

In the following table, the fact that a word is given two or three English synonyms does not indicate that it is of uncertain meaning, but that the English forms vary.

TABLE OF CORRELATIVE WORDS

	<i>Indefinite</i>	<i>Collective Distributive General</i>	<i>Interrogative Relative</i>	<i>Negative</i>	<i>Demonstrative</i>
<i>Quality</i> adjectival	<b>IA</b> Some kind of Any kind of Any, Some	<b>ĈIA</b> Every kind of Each kind of Each, Every	<b>KIA</b> What kind of? ( <i>ĉia</i> ).....as	<b>NENIA</b> No kind of No such No	<b>TIA</b> That kind of Such kind of Such a
<i>Motive</i> adverbial	<b>IAL</b> For some cause For any cause For any reason	<b>ĈIAL</b> For every cause For all reasons	<b>KIAL</b> For what cause? For what reason? Why?	<b>NENIAL</b> For no cause For no reason	<b>TIAL</b> For that reason For that cause Therefore
<i>Time</i> adverbial	<b>IAM</b> At some time At any time Ever	<b>ĈIAM</b> All the time For all time Always	<b>KIAM</b> At what time? When?	<b>NENIAM</b> At no time Never	<b>TIAM</b> At that time Then
<i>Place</i> adverbial	<b>IE</b> In some place Somewhere Anywhere	<b>ĈIE</b> In every place Everywhere	<b>KIE</b> In what place? Where?	<b>NENIE</b> In no place Nowhere	<b>TIE</b> In that place There

<i>Manner</i> adverbial	<b>IEL</b> In some manner In some way Somehow	<b>ĈIEL</b> In every way In all ways	<b>KIEL</b> In what manner? Like, How? As?	<b>NENIEL</b> In no manner In no way Nohow	<b>TIEL</b> In that way So, As Like
<i>Possession</i> pronominal	<b>IES</b> Some person's Some one's Anybody's	<b>ĈIES</b> Everybody's Every one's Each one's	<b>KIES</b> Whose?	<b>NENIES</b> Nobody's No one's	<b>TIES</b> That person's That one's
<i>Thing</i> substantival pronominal	<b>IO</b> Something Anything	<b>ĈIO</b> Everything All things All	<b>KIO</b> What?	<b>NENIO</b> Nothing	<b>TIO</b> That thing That
<i>Quantity</i> adverbial	<b>IOM</b> Some quantity Somewhat A little	<b>ĈIOM</b> All of it All	<b>KIOM</b> How much? How many? ( <i>kiom</i> ).....as	<b>NENIOM</b> No quantity None	<b>TIOM</b> That much So many As many
<i>Individuality</i> pronominal	<b>IU</b> Some person Somebody Anybody	<b>ĈIU</b> Everyone, Each Every ĈIUJ, All	<b>KIU</b> What one? Which? Who?	<b>NENIU</b> Nobody No one	<b>TIU</b> That person That one That

## § 42. FOREIGN WORDS

All such words as *telegraph*, *phonograph*, *automobile*, etc., which are introduced into all the modern languages by the progress of science and industry, are also introduced into Esperanto, but take the phonetic spelling and the proper grammatical ending: **telegrafo**, **fonografo**, **aŭtomobilo**, etc.

## § 43. PROPER NAMES

Important proper names are adopted in Esperanto and take the phonetic spelling (**Parizo**, **Sokrato**, **Napoleono**), but ordinarily names of persons are simply taken as they are (**Goethe**, **Byron**, **Longfellow**). Names of places may also be taken as they are in the national tongue (**Cleveland**, **Stuttgart**, **Oxford**).

## § 44. WEIGHTS AND MEASURES

Esperantists use the metric system: 39.37 inches = **metro** (1 m.).

.001 = **milimetro**.

10 = **dekametro**.

.01 = **centimetro**.

100 = **hektometro**.

.1 = **decimetro**.

1000 = **kilometro**.

**Gramo** (1 gr.) = 15.432 grains avoirdupois.

(**Kilogramo** = 2.2046 lbs.)

**Litro** (1 l.) = 61.024 cubic inches.

(**Hektolitro** = 2½ bushels.)

§ 45. INTERNATIONAL UNIT OF VALUE

Esperantists use in their business intercourse the system proposed by the Swiss scientist René de Saussure, of Geneva. This international unit of value makes price quotations equally clear to persons of all countries.

One **speso** (1 s.) = .049 cent.

One **spesdeko** (1 sd.) =  $\frac{1}{2}$  cent.

One **spescento** (1. sc.) = 5 cents.

One **spesmilo** (1 sm.) = 50 cents.

The **spesmilo** (1 sm.) is the unit ordinarily used. It represents approximately \$0.50 in American money, Fr. 2.50 in Latin money, Mrk. 2 in German money, etc. 1 sm. = 2s. in British money.

NACIOJ

LANDOJ

<b>Afrikanano</b> , African.	<b>Afriko</b> , Africa.
<b>Alaskanano</b> , Alaskan.	<b>Alasko</b> , Alaska.
<b>Alĝeriano</b> , Algerian.	<b>Alĝerujo</b> , Algeria.
<b>Amerikanano</b> , American.	<b>Ameriko</b> , America.
<b>Anglo</b> , English.	<b>Anglujo</b> , England.
<b>Argentino</b> , native of Argentine Republic.	<b>Respubliko Argentena</b> , Argentine Republic.
<b>Aŭstraliano</b> , Australian.	<b>Aŭstralio</b> , Australia.
<b>Aŭstrianano</b> , Austrian.	<b>Aŭstrio</b> , Austria.
<b>Aziano</b> , Asiatic.	<b>Azio</b> , Asia.

<b>Belgo</b> , Belgian.	<b>Belgujo</b> , Belgium.
<b>Bohemo</b> , Bohemian.	<b>Bohemujo</b> , Bohemia.
<b>Boliviano</b> , Bolivian.	<b>Bolivio</b> , Bolivia.
<b>Brazilano</b> , Brazilian.	<b>Brazilo</b> , Brazil.
<b>Brito</b> , British citizen.	<b>Brita Imperio</b> , British Empire.
<b>Bulgaro</b> , Bulgarian.	<b>Bulgarujo</b> , Bulgaria.
<b>Ĉiliano</b> , Chilian.	<b>Ĉilio</b> , Chili.
<b>Dano</b> , Danish.	<b>Danujo</b> , Denmark.
<b>Egipto</b> , Egyptian.	<b>Egiptujo</b> , Egypt.
<b>Eŭropano</b> , European.	<b>Eŭropo</b> , Europe.
<b>Finno</b> , Finn.	<b>Finnlando</b> , Finland.
<b>Franco</b> , Frenchman.	<b>Francujo</b> , France.
<b>Germano</b> , German.	<b>Germanujo</b> , Germany.
<b>Greko</b> , Greek.	<b>Grekujo</b> , Greece.
<b>Hindo</b> , Hindu.	<b>Hindujo</b> , India.
<b>Ĥino</b> , Chinese.	<b>Ĥinujo</b> , China.
<b>Hispano</b> , Spaniard.	<b>Hispanujo</b> , Spain.
<b>Holandano</b> , Dutch.	<b>Holando</b> , Holland.
<b>Hungaro</b> , Hungarian.	<b>Hungarujo</b> , Hungary.
<b>Indiano</b> , Indian.	
<b>Irlandano</b> , Irish.	<b>Irlando</b> , Ireland.
<b>Islandano</b> , Icelander.	<b>Islando</b> , Iceland.
<b>Italo</b> , Italian.	<b>Italujo</b> , Italy.
<b>Japano</b> , Japanese.	<b>Japanujo</b> , Japan.
<b>Judo</b> , Jew.	<b>Judujo</b> , Judea.
<b>Kanadano</b> , Canadian.	<b>Kanado</b> , Canada.
<b>Meksikano</b> , Mexican.	<b>Meksiko</b> , Mexico.
<b>Norvego</b> , Norwegian.	<b>Norvegujo</b> , Norway.

<b>Oceaniano</b> , Oceanian.	<b>Oceanio</b> , Oceania.
<b>Perso</b> , Persian.	<b>Persujo</b> , Persia.
<b>Polo</b> , Polander.	<b>Polujo</b> , Poland.
<b>Portugalo</b> , Portuguese.	<b>Portugalujo</b> , Portugal.
<b>Rumano</b> , Rumanian.	<b>Rumanujo</b> , Rumania.
<b>Ruso</b> , Russian.	<b>Rusujo</b> , Russia.
<b>Servo</b> , Servian.	<b>Servujo</b> , Servia.
<b>Siberiano</b> , Siberian.	<b>Siberio</b> , Siberia.
<b>Skoto</b> , Scotch.	<b>Skotlando</b> , Scotland.
<b>Svedo</b> , Swede.	<b>Svedujo</b> , Sweden.
<b>Sviso</b> , Swiss.	<b>Svisujo</b> , Switzerland.
<b>Turko</b> , Turk.	<b>Turkujo</b> , Turkey.
<b>Usonano</b> , U. S. A. citizen.	<b>Usono</b> ,* U. S. A.
<b>Venezuelano</b> , Venezuelan.	<b>Venezuelo</b> , Venezuela.

NOTE.—La sufikso -ujo povas esti anstataŭata per -lando (Svedlando).

#### URBEGOJ

<b>Londono</b> , London.	<b>Ĉikago</b> , Chicago.
<b>Nov-Jorko</b> , New York.	<b>Berlino</b> , Berlin.
<b>Parizo</b> , Paris.	<b>Romo</b> , Rome.
<b>Pekino</b> , Pekin.	<b>Vieno</b> , Vienna.

\* La primitiva formo estas : Unuigitaj Ŝtatoj.

## CORRESPONDENCE

The formal style of address in Esperanto is:

**Estimata Sinjoro.            Estimata Fraŭlino.**  
**Estimata Sinjorino.**

The form: My dear Sir, etc., translated into Esperanto, *Mia kara sinjoro*, would show some degree of affection.

To a man who works for the same cause as you do, you would write:

**Estimata Samideano** (sam'-ide'-au'-o, fellow-thinker).

To close a letter, the following forms are used:

**Respekte via,                    Tre kore via,**  
**Kun granda estimo,        Kun kora saluto,**  
**Sincere via,**

## MODELA LETERO

Al la Administranto de la gazeto *Lingvo Internacia*, 33 rue Lacépède, Paris.

BOSTONO, 17<sup>an</sup> de Novembro.

Estimata Sinjoro:—

Mi sendas al vi per internaciaj kuponoj dudek kvin cendojn (sm. 0.50), petante, ke vi bonvolu enpresi sur la kovrilo de via gazeto la jenan anoncon:



*Dek sep-jara esperantistino deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun gejunuloj de diversaj landoj. Afable sin turnu al*

*Fraŭlino Ruth Narson,  
197 Grand Avenue, Boston, U. S. A.*

Esperante ke vi bonvolos enpresii mian anonceton en la plej proksima numero de via gazeto, mi salutas vin tre respekte,

(F-no) RUTH NARSON.

#### ABBREVIATIONS

**S-ro** or **S<sup>o</sup>** = Sinjoro.

**S-no** or **S<sup>ino</sup>** = Sinjorino.

**F-no** or **F<sup>ino</sup>** = Fraŭlino.

**D-ro** or **D<sup>o</sup>** = Doktoro.

Etc.

## LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,  
 Tra la mondo iras forta voko;  
 Perflugiloj de facila vento  
 Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
 Ĝi la homan tiras familion:  
 Al la mond' eterne militanta  
 Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero  
 Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
 Kaj rapide kreskas la afero  
 Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
 Inter la popoloj dividitaj;  
 Sed dissaltos la obstinaj baroj  
 Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
 Komprenante unu la alian,  
 La popoloj faros en konsento  
 Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
 En laboro paca ne laciĝos,  
 Ĝis la bela sonĝo de l'homaro  
 Por eterna ben' efektiviĝos.

-L. L. ZAMENHOF.

# ESPERANTO TAUGHT BY MAIL

---

---

## THE INTERNATIONAL ESPERANTO INSTITUTE

(Branches in different countries and cities)

CLASSES IN ESPERANTO BY THE  
MODERN METHODS

CENTRAL ORGANIZATION FOR  
EXAMINATIONS AND DIPLOMAS

---

---

NEW YORK BRANCH

## SCHOOL OF ESPERANTO

126 Cleveland Street

Brooklyn, N. Y.

Inaugurated the 1st of October, 1908

---

---

MEMBERSHIP FEE:

\$5.00 for the full course of fifty lessons (including text-book)







SAKIN COUNTY FREE LIBRARY  
SAN RAFAEL, CALIFORNIA

